1982 junio
75-a jaro
n-ro 918 (6)
aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando

Interesaj kontaktoj en Münster

Vi trovos,

ke s-ro Helmar Frank en la ĉi-numera ĉefartikolo nomas Esperanton "ILo". Por venĝi al li, jen ni ĵus nomis lin "s-ro" anstataŭ tiu kutima "prof. d-ro". Ĉio ĉi kune akordiĝas kun foje aŭdita proverbo, kies Esperanta traduko sonus jene: "Vi rajtas nomi min eĉ 'poto'; nur ne rompu min!" Tiel do! Ne timu de tiu nova nomo per kiu prof. Frank aludas la Internacian Lingvon. Ni ne baldaŭ ekuzos ĝin, sed se al prof. Frank tiu mallongigo pli konvenas, – li ja havu ĝin! Pleje gravas, ke la kibernetikistoj okupiĝas pri Esperanto kaj komencas utiligi ĝin por siaj fakaj celoj, kaj la demando, kiel ili nomas la lingvon – tio ĉe ni estas nur la naŭa afero laŭ la graveco, kion foje ankaŭ kibernetikistoj mem komprenos, ni esperas. Vi eble demandos vin, kial subite tiel multa atento al la faka laboro en ĉi tiu numero. Nu, kial? Simple, ĉar ĝi okazas kaj ĉar ĝi estas grava. Cetere, leganto, plendema kaj aktiva (tiajn ni ŝatas!), riproĉis al ni lastatempe pro la manko de fakaj novaĵoj. Jen do ĉi tiu numero kiel nia pardonpeto. Iu alia ĵus skribis tute plore, ke al li tie en unu el la Amerikoj – se ni ne eraras – terure mankis recenzoj de novaj libroj en la maja numero. Nu, vi rimarkos, ke ni provis malplorigi ankaŭ tiun leganton. Supozeble, multaj el vi ceteraj ĝojas pro la simpla fakto, ke ĉi tiu numero fine aperis. Kredu, ke ankaŭ ni dividas tiun vian ĝojon. Ĝis baldaŭ!

Enhavo

101 La Internacia Lingvo kaj la scienco: Kiel konkeri la "fortikaĵon"? (prof. d-ro Helmar Frank)
104 Nova seminario en aŭgusto (Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko, Ĉeĥoslovakio)
105 Preparoj por la Centjara Jubileo: Vojo al kunlaboro (S. Milojević)
106 Letero el Ĉinio: Meditoj en pekina pavilono (Geoffrey Sutton)
107 Faka agado: Pli ol 900 komputistoj (d-ro Péter Broczkó)
Informado: Aplaŭdon por BBC! (Sybil Sly)
108 Fervojista kongreso okazis en Hungario: Kio nova en la fervoja mondo? (G. Ritterspach)
109 Landa agado: Kunloĝado en Japanio (K. Kikusima)
110 Recenzoj: "Regulus" de Lorjak (K. Schubert); "Germana ĵurnalisto komentas" de S. Maul (U. Lins); "El subaj fontoj" de E. Urbanová (L.H. Knoedt); "Juda saĝo" de S. Feldbaum / L.G. Karlsson (I. Sumber); "Prometeo ligita" de Eŝhilo / A. Goodheir (M. Nervi); "Elektitaj satiroj" de E. Kiŝon (R. Corsetti); "La konduto de grandsinjoro Tadanao" de Kan Kikuĉi (G. Berveling); "Nudpieda Gen" de Keizi Nakazawa (C.R.L. Power)
114 Laste aperis. . . (novaj libroj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
115 TEJO-paĝo: Eksteraj rilatoj de TEJO: Prepare al Internacia Junulara Jaro en 1985 (Martin Haase); Seminario en Hungario: Homaj loĝlokoj
116 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
118 Oficiala informilo de la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio
119 Anoncetoj
120 Esperanto en radio (kompleta tabelo de la elsendoj en Esperanto)

La kovrilo

La kvar fotoj sur la kovrila paĝo estas faritaj de almenaŭ tri fotistoj (Hilpert, MacGill, Smolić) kaj – kiel vi mem konstatas – ili prezentas amaseton da vizaĝoj dum la 60a Germana Esperanto-Kongreso kaj dum aparta kunveno al kiu ni dediĉas la paĝon 105. La germanoj unuflanke eble kontentos, ke ni dediĉas la kovrilan paĝon al ilia kongreso, sed ili aliflanke prave povus malkontenti, ke ni pli-malpli diras nenion pri tiu ilia jara aranĝo. Tamen, vi ja scias, ke en FR Germanio nun aperas propra periodaĵo "Esperanto aktuell", kiu jam amplekse raportis la okazintaĵojn en Münster. Vidu do la paĝon 105.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenwg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. **Telefono:** (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto). **Fondita** en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo varias laŭlande. Petu de via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero 4,– gld.

Anonctarifo (gld.): 1p. 1000, 1/2p. 530, 1/4p. 290, 1/8p. 170, 1/16p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Coolsingel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri financo kaj administrado: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Vicprezidanto kaj estrarano pri planado kaj landa kaj regiona agado: d-ro Renato Corsetti, via delle Cave 82/C, I-00181 Roma, Italio; tel. (06) 78 89 970.

Vicprezidanto kaj estrarano pri kulturo kaj edukado: s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavik, Islando; tel. (91) 3 73 01.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23-274.

Estrarano pri informado kaj delegita reto: s-ino Ursula Grattapaglia, Fazenda Escola "Bona Espero", BR- 77260 Alto Paraíso (GO), Brazilo; tel. (061) 226 8101 (en Brasília).

Estrarano pri kongresoj kaj virina agado: s-ino Eliza Kehlet, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio; tel. (031) 51 46 36.

Estrarano pri faka agado: s-ro Petâr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG- , 1421 Sofia, Bulgario; tel. 65 52 43.

Estrarano pri esploroj kaj eksteraj rilatoj: prof. Humphrey Tonkin, Stouffer College House, 3700 Spruce Street, Philadelphia, PA 19104, Usono; tel. (215) 387 8288.

Maandelijks tijdschrift "esperanto", nr. 918 (6), juni 1982. Verantw. uitgever: G. Maertens, Prins Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge, België

Kiel konkeri la "fortikaĵon"?

Profesoro Helmar Frank estas unu el la plej interesaj kaj valoraj personecoj, kiuj en la lasta jardeko aliĝis al la Esperanto-movado. Oni delonge ne vidis en niaj vicoj batalanton de tiaj vervo kaj kapacito. Tamen, pri Frank oni apenaŭ povas aserti, ke li estas en la Movado. Male, anstataŭ aliĝi al la tradiciaj movadaj strukturoj, Frank kreis siajn proprajn – fakajn – por tie praktiki sian strategion. Ni invitis lin raporti pri la rezultoj kaj celoj de tiu plurrilate unika agado. Li mem ŝajnas ekkompreni, ke ĉia E-laboro nepre bezonas apogon de la Movado.

LA FINA VENKO de la Internacia Lingvo ne eblos sen pli-malpli samtempa, dinamisma progreso en tri tute malsamaj sed strikte interligitaj agadkampoj: Nepras 1) plia politika agnosko de Esperanto, 2) plia mondvasta instruado de ĝi, 3) plia uzado de Esperanto kiel internacia komunikilo en la sciencoj.

Aliloke[1] estas detale eksplikite, kial ĉiuj tiuj tri kampoj same necesas. Neniu el ili estas pli grava ol la alia, ĉar nenie stabila sukceso eblas, se en la du aliaj kampoj la pozicio de la Internacia Lingvo estas tro malforta. Tial estus senefike, se la Movado koncentriĝus al unu el la tri agadkampoj.

Kondiĉoj de efika helpo fare de unuopuloj

Unuopulo, kiu pretas disponigi al la apogo de la Internacia Lingvo laborforton kaj monon, elspezu ilin kompreneble precipe tie, kie li aŭ ŝi mem plej efike povas agadi. Ekzemple, politikisto ĝenerale pli efike uzas liberan tempon agante sur la lingvopolitika kampo, ol gvidante Esperanto-kurson; kaj profesia instruisto tre verŝajne kontribuas pli efike al la komuna celo per varbado por kaj realigado de kursoj, ol per rekomendado de la Internacia Lingvo al internaciaj fakaj organizaĵoj.

Tamen, ekzistas okazoj por kontribui tre efike al la progreso en alia ol la plej proksima el la tri agadkampoj – elspezante preskaŭ neniom da mono aŭ da tempo. Tia okazo estis, ekzemple, la propono transdonita en 1966 al Unuiĝintaj Nacioj, kun 920 954 subskriboj de unuopuloj, kiuj plejofte ne estis profesiaj politikistoj. Nuntempe simila okazo por mondvasta kontribuo de la esperantistaro al grava progreso prezentiĝas sur la scienca batalkampo. La ŝanco estas bonega, ke la Internacia Lingvo plifortigos sian pontokapan pozicion en unu el la plej modernaj kaj influriĉaj sciencoj, kaj ke ĝi de tie post nelonge konkeros la "fortikaĵon Scienco" entute. Tiu pontokapo troviĝas sur la kibernetika kampo. La plifortigo de la tie konkerita tereno kaj la sukcesa posta disvastigo en aliaj sciencaj fakoj dependas de la subtenad-preteco de kelkdeko da esperantistaj sciencistoj kaj de kelkcento da esperantistaj nesciencistoj. Tiuj ĉi eĉ bezonas elspezi neniom aŭ preskaŭ neniom da mono aŭ tempo tiucele; necesas nur celkonscia, kunordigita agado.

Kio estas kibernetiko?

La kibernetiko estas kvazaŭ komuna tegmento de diversaj klopodoj analizi, ekspliki kaj regi la procezojn de la prilaborado de informoj. Tiajn "informecajn procezojn" studas la biokibernetiko en la biologiaj sciencoj, kaj la reguladteknologio, informadiko (komputilscienco) kaj aliaj branĉoj de la inĝenierkibernetiko sur la kampo de la teknikaj sciencoj. La lingvo-kibernetiko, la klerigkibernetiko (kibernetika pedagogio), la kibernetika psikologio (informpsikologio), la kibernetika ekonomiko kaj aliaj specialaj antropokibernetikaj fakoj okupiĝas pri la kultura kaj prihoma sferoj de la homa socio; la ĝenerala kibernetiko konsideras nur la komunajn trajtojn kaj strukturojn de ĉiuj ĉi specialigitaj branĉoj (vidu la apudan grafikaĵon).

La nomon "kibernetiko" por ĉi tiu "ponto inter diversaj sciencoj" (kiu precipe kunligas la prihomajn kun la prinaturaj sciencoj kaj kun la inĝeniersciencoj) enkondukis unu el la ĉefaj fondintoj de la kibernetiko, nome la usona matematikisto Norbert Wiener – filo de la lingvisto Leo Wiener, kiu, kune kun kelkaj samgimnazianoj, okaze de la 19a naskiĝtago de Zamenhof (1878-12-17) partoprenis[2] la "vivigon" de "Lingwe Uniwersala", la "pra-Esperanta" antaŭŝtupo de la Internacia



Pluraj parolantoj de la Internacia Lingvo ĉefrolis en la 9a Internacia Kongreso de Kibernetiko: La prezidantaro de la simpozio pri lingvokibernetiko (de maldekstre): F. Pennacchietti, M.T. Janot-Giorgetti, H. Frank kaj B.A. Sherwood

Lingvo, kiun Zamenhof jam estis kreinta antaŭ siaj studjaroj.

Tiu ĉi "pra-ligo" inter Esperanto kaj kibernetiko nek estas la ununura nek la ĉefa kialo de la ekinteresiĝo de kibernetikistoj por ĉi tiu planlingvo. Aliloke estas klarigitaj la multe pli gravaj enhavaj kialoj[3]. Sufiĉas ripeti, ke la kibernetiko interesiĝas pri la plej efikaj manieroj – ĉu ekzistantaj, ĉu fareblaj! – komuniki kaj prilabori informon, kaj ke, aliflanke, la Internacia Lingvo ja estas "farita" kaj estas nun la plej efika inter la disponeblaj lingvaj komunikiloj; tial la kutiman antaŭjuĝon kontraŭ ("arte"-)faritaj lingvoj kibernetikistoj ne povas flegi – des malpli ke ili por sia komputilaro ja kreis multe malpli "naturajn" kodojn!

La granda ŝanco

Se plue amasiĝos kibernetikaj esploroj pri la Internacia Lingvo, ankaŭ plifacilos kaj plioftiĝos la skriba kaj parola uzo de ĉi tiu lingvo en kibernetiko. Kaj ju pli amasiĝos fake bonkvalitaj kontribuoj internacilingvaj en la (unuavice: antropo-)kibernetika fakliteraturo kaj dum kibernetikaj kongresoj, des pli stabila fariĝos la pozicio kiel internacia faklingvo (jam de kelkaj jaroj:) en la klerig- kaj lingvo-kibernetikaj branĉoj aŭ (de 1980:) entute en la antropokibernetiko kaj eĉ (poste daŭre:) en la kibernetiko tute ĝenerale. Pro tio, ke la kibernetiko rilatas al multaj aliaj fakoj, kaj preskaŭ ĉiu kibernetikisto "ĉefofice" estas alispeca fakulo (lingvisto, teknikisto, klerigsciencisto, ekonomikisto, informadikisto ktp), la ekzemplo, kiun jam donas la kibernetika fakularo, rapide disvastiĝos ankaŭ en aliajn sciencojn. Kiam la Movado estos venkinta la "fortikaĵon Scienco", la "fina venko" estos proksima!

Mallonga retrospektivo

La 6-paĝa teksto de "Antaŭrimarkigoj" en la internacilingva volumo[4] de la aktoj de la 9a Internacia Kongreso pri Kibernetiko skizas la mallongan historion de la enkibernetikiĝo de la Internacia Lingvo (ILo[5]).

Jam en 1974 la germanaj klerigkibernetikistoj decidis ekuzi ILon kiel sian estontan internacian komunikilon. Ekde 1975 la Instituto pri Kibernetiko Berlin/Paderborn (D) aldonis al la artikoloj de sia kibernetika fakrevuo *GrKG/Humankybernetik* resumojn en ILo. Instituto pri Kibernetiko en Buenos Aires (RA) ekaperigis seslingvan kibernetikan fakrevuon (*Revista del Instituto de Cibernética*), en kiu aperadas ankaŭ internacilingvaj artikoloj. Ankoraŭ samjare la estraro de Internacia Kibernetika Asocio en Namur (B) decidis okazigi, en la kadro de sia 9a Internacia Kongreso de Kibernetiko, lingvokibernetikan simpozion, dum kiu provcele ILo estu tria laborlingvo krom la angla kaj la franca.

La buŝa ekuzo de ILo en la klerigkibernetiko okazis en 1976 dum Internaciaj Someraj Universitataj Semajnoj en Primoŝteno (YU)[6]. ILo kvazaŭ oficialiĝis en la universitato de São Paulo (BR), kiu, laŭ instigo de prof. d-ro Oswaldo Sangiorgi invitis la aŭtoron de ĉi tiu artikolo, kiel gastprofesoro, internacilingve realigi, en 1977, kursojn pri kibernetika pedagogio, kibernetika psikologio kaj lingvokibernetiko.

Internacia Scienca Simpozio en Marília (BR) en 1979 uzis ekskluzive la Internacian Lingvon kaj okazis sub la aŭspicioj de Internacia Kibernetika Asocio. Ties prezidanto, prof. d-ro G.R. Boulanger, – eklerninte tiucele la lingvon! – persone partoprenis la simpozion

kaj sekve subtenis poste la decidon de la estraro kaj membrokunveno de sia asocio, ke ILo almenaŭ provcele ne nur estu laborlingvo de speciala simpozio dum la 9a Internacia Kongreso de Kibernetiko en 1980, sed samranga tria kongreslingvo en ĉiuj kvar sekcioj de la kongreso (respondaj al la kvar supre menciitaj branĉoj de la kibernetiko, reliefigitaj en la grafikaĵo sur paĝo 101).

La kongresaktoj aperis en du volumoj: la unua enhavas la tekstojn de la anglaj kaj francaj prelegoj kaj ne estas havebla sen la dua volumo[4] kun la 21 internacilingvaj prelegoj. Aliflanke ĉi tiu dua volumo aperis en 1982 ankaŭ kiel kromvolumo de la jam menciita, kvaronjara revuo *GrKG/Humankybernetik* (en kiu ekde ĉi tiu jaro aperadas ne nur resumoj sed ankaŭ artikoloj, krom en la germana, ankaŭ en la internacia, franca kaj angla lingvoj) – kaj tiel estas dise aĉetebla. La plej fama lingvistika eldonejo en F.R. Germanio, Gunter Narr Verlag Tübingen, transprenis ekde 1982 la revuon inkluzive la kromvolumojn, kio grandigos la reputacion de la Internacia Lingvo en lingvistikaj rondoj, almenaŭ germanlingvaj.

Decidaj 12 monatoj

De la 23a ĝis la 28a de aŭgusto 1983 okazos en Namur (B) la jubilea 10a Internacia Kongreso de Kibernetiko. Ĝi denove havos la menciitajn kvar sekciojn, al kiuj distribuiĝos pluraj simpozioj – i.a. "Lingvokibernetiko", "Kibernetika Pedagogio", "Kibernetika Psikologio", "Kibernetika Ekologio" kaj "Kibernetika Ekonomio" (la listo povas kompletiĝi ĝis novembro1982).

Nur por la antropokibernetika sekcio jam estas farita la decido, ke ILo estu samranga laborlingvo en ĉiuj simpozioj. Por la tri aliaj sekcioj ree oni nur akceptos la anglan kaj francan ĝenerale, kondiĉe ke ĝis novembro 1982 ne estos

– aŭ jam la decido, laŭstatute enkonduki la Internacian Lingvon kiel samrangan oficialan trian lingvon de Internacia Kibernetika Asocio,

– aŭ tiom da internacilingvaj prelegproponoj por la aliaj simpozioj de la kongresoj, ke la estraro denove decidos la ĝeneralan samrangecon de la Internacia Lingvo.

Dum la kongreso mem ekestos la problemo, ĉu denove (kiel en 1980) troviĝos (almenaŭ unu) lerta interpretisto en la francan aŭ en la anglan. Tiam certe ripetiĝos la sukceso de la jaro 1980, tiel ke la ĝenerala membrokunveno je la fino de la jubilea kongreso (dum kiu prof. Boulanger retiriĝos kiel prezidanto kaj nova prezidanto estos elektita!) definitive akceptos por la estonteco la Internacian Lingvon kiel trian oficialan kaj laboran lingvon sian.

Ĝis tiu jubilea kongreso ankaŭ la eldonista mondo ekscios, ĉu la uzado de ILo (krom etnaj lingvoj) en fakrevuoj kaj faklibroj helpas aŭ malhelpas la disvastigon de tiaj eldonaĵoj. La kriterioj estos precipe la jenaj:

1) Ĉu la nun kvarlingva revuo *GrKG/Humankybernetik* (Internacia Revuo por Modeligo kaj Matematikizo en la Homsciencoj) post ĉi tiu internaciiĝo akiros almenaŭ cent novajn abonantojn aŭ, ĉu ĝi, kontraŭe, tiel perdos pli ol ĝi gajnos?

2) Ĉu la internacilingva kongresvolumo menciita[4] akiros almenaŭ 200 aĉetantojn krom tiuj, kiuj devige



En la nuna estraro de Internacia Kibernetika Asocio troviĝas pluraj ankaŭ en la Esperanto-movado konataj personoj (de maldekstre): F.A. Pennacchietti, G.R. Boulanger – fondinto kaj prezidanto de la Asocio, T. Ören, J. Lemaire, O. Sangiorgi, H.A. Fatmi kaj H.G. Frank.

ĝin jam ricevis kune kun la nacilingva kongresvolumo? 3) Ĉu la vendado de libroj[7] el la "Eŭropa Serio" (en ILo kun germanaj resumoj) de Leuchtturm-eldonejo daŭros?

Kion fari?

Fakuloj – kaj pri la kibernetiko mem kaj pri ĉiuj najbaraj sciencoj tuŝataj de ĝi! – anoncu plej malfrue ĝis novembro 1982 prelegojn internacilingvajn (aŭ proponu kromajn simpoziojn) por la 10a Internacia Kibernetika Kongreso, kiu denove estos interfaka evento! Oni skribu angle aŭ france al la sidejo de l'Association Internationale de Cybernétique (Palais des Expositions, B-5000 Namur), aŭ internacilingve aŭ germane al la Instituto pri Kibernetiko Berlin/Paderborn (Kleinberger Weg 16B, D-4790 Paderborn). Anoncu sin ankaŭ interpretistoj por traduki anglen aŭ francen!

Kiu ne volas prelegi, tamen – eĉ estante nesciencisto! – baldaŭ **provizore** aliĝu al la kongreso, kaj tiam nepre skribu en la rubrikon "elektita lingvo" de la provizora aliĝilo: "Internacia Lingvo". (La provizora aliĝo estas senkosta kaj nur havigas al la provizora aliĝinto "pliajn informojn pri la kongreso" en la elektita lingvo!)

Ĉiuj – ne nur sciencistoj – rajtas aliĝi al Internacia Kibernetika Asocio kiel membro, por tiam celkonforme voĉdoni aŭ voĉdonigi (per transdono de la voĉdonrajto al persone ĉeestonta membro) dum la jaraj ĉefkunvenoj (ĉi-jara verŝajne en novembro) kaj dum la kongreso en 1983. Decidendaj ja estos la estonta uzo de ILo kaj la konsisto de la nova estraro. (La jara membrokotizo estas 700 belgaj frankoj.)

Finfine, ĉiu, kiu celas helpi la finan venkon de la Internacia Lingvo kaj tiucele stimuli la inspiran progreson sur la scienca kampo antaŭ la jubilea jaro 1987, helpu disvastigi la menciitajn, provcele ne nur nacilingvajn, kibernetikajn revuojn kaj faklibrojn! Kompreneble helpos propra aĉeto aŭ abono kaj uzado kiel varbmaterialo precipe en sciencaj rondoj. (Al esperantistoj Instituto pri Kibernetiko Paderborn povas malfermi vojon ricevi la revuon *GrKG/Humankybernetik* jam pagante nur DM 40,- jare.) Sed eĉ ne necesas elspezi propran monon: pli efike estas, ke tiuj, kiuj vere volas kontribui al la konkero de la "fortikaĵo Scienco", aĉetigu aŭ abonigu la menciitajn internacilingvajn eldonaĵojn fare de la persone uzataj bibliotekoj (universitataj, entreprenaj, urbaj k.a.)!

Prof. d-ro Helmar Frank

[1] Carlevaro/Lobin (komp.): *Enkonduko en la interlingvistikon /Einführung in die Interlinguistik*. Leuchtturm-Verlag, D-6146 Alsbach, p. 231-237. (DM 29,-)

[2] Golden: Leo Wiener, pioniro de pra-Esperanto, *Esperanto*, 72a jaro, 877 (1), 1979, p. 3-6.

[3] Frank: Kibernetiko kaj la Internacia Lingvo. *Eŭropa dokumentaro* 32 (1981), p. 53-58, kaj "Kibernetiko kaj interlingvistiko" en *Lingvokibernetiko*[4], p. 11-18.

[4] Frank/Yashovardhan/Frank-Böhringer (komp.): *Lingvokibernetiko/Sprachkybernetik*, Gunter Narr Verlag Tübingen, 1982. (DM 28,-; por abonantoj de la revuo *GrKG/Humankybernetik*: DM 10,-)

[5] Malpli ol la pli nova nomo "Esperanto" de la Internacia Lingvo ŝokas neesperantistajn scienculojn kelkfoje la originala nomo "Lingvo Internacia" aŭ "Internacia Lingvo"; en la kibernetikan (nacilingvan kaj internacilingvan) literaturon enpenetris la mallongigo "ILo".

[6] La kongreslibreton pri la kibernetikaj prelegoj – kun germanlingvaj resumoj – aperigis H. Bermann kaj S. Štimec sub la titolo *Klerigo kaj prikalkulado/Bildung und Berechnung* ĉe Leuchtturm-Verlag, D-6146 Alsbach. (DM 16,-)

[7] Temas precipe pri la libroj menciitaj en la piednotoj 4 kaj 6, kaj pri Hilgers/Yashovardhan: *EK-vortaro de matematikaj terminoj/EG-Wörterbuch mathematischer Begriffe*. (DM 17,-)

Nova seminario en aŭgusto

EN LA JANUARA NUMERO de ĉi tiu revuo aperis mallonga informo pri tio, ke en České Budějovice (Ĉeĥoslovakio) de la 13a ĝis la 15a de aŭgusto 1982 okazos Seminario pri la Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (SAEST-82). Jen iom pli da detaloj pri tiu aranĝo:

La unua Seminario pri la Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko estis organizita en la slovaka urbo Žilina en 1978. Ĝia sukceso (ĉ. 60 partoprenantoj kaj 16 prelegoj) instigis plani pliajn similajn aranĝojn kaj en Ĉeĥoslovakio kaj en aliaj landoj.

En 1980 en la ĉeĥa urbo Usti-nad-Labem la 2a samtitola seminario okupiĝis pri faklingvaj demandoj kaj pri natursciencaj temoj, tamen, ĉi-lastaj ĉiuj rilatis al la biosfero aŭ al la homa vivmedio. La seminarion partoprenis jam 80 personoj, kaj la pri ĝi eldonita kajero enhavis 20 prelegojn.

En 1981, la samtitola konferenco en Žilina faris envindan plian paŝon, eĉ salton. Ĝi daŭris 3 tagojn, laboris tri paralelaj sekcioj, kie oni prezentis entute 48 prelegojn pri natursciencaj kaj teknikaj temoj. Krome, oni okupiĝis pri la necesaj konkretaj paŝoj por plua evoluigo de la aplikado de Esperanto por sciencaj celoj kaj formulis ĉi-rilate utilajn rekomendojn. La konferencon ĉeestis 152 personoj el 13 landoj kaj la materialo aperis post la konferenco en du volumoj.

Ĉiuj ĉi aranĝoj estis organizitaj helpe de la Ĉeĥoslovaka landa scienc-teknika asocio.

La ĉeftemo de la ĉi-jara Seminario estos: "Energio – la tutmonda problemo". Krom tio oni okupiĝos pri la problemoj de la faka terminologio kaj faka tradukado. SAEST-82 estas organizata de la Scienc-Teknika Sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kunlabore kun Scienca Eldona Centro de UEA (SEC), de kiu vi povas peti pliajn informojn pri la aranĝo: Scienca Eldona Centro de UEA, Pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario.

PREPAROJ POR LA CENTJARA JUBILEO:

Vojo al kunlaboro

LA 30an DE MAJO, en la kadro de la 60a Germana Esperanto-Kongreso en Münster (FR Germanio), okazis interesa kunveno dediĉita al la preparoj por la Centjara Jubileo de Esperanto. Laŭ invito de s-ro G. Maertens, prezidanto de UEA, tie renkontiĝis reprezentantoj de deko da internaciaj movadaj kaj nemovadaj organizaĵoj, por diskuti la vojojn al kunlaboro de ĉiuj uzantoj de la Internacia Lingvo en la preparoj por la Centjara Jubileo. Ankaŭ por multaj el niaj legantoj estas interese informiĝi, ke al la kunveno venis prof. d-ro Ivo Lapenna, kiel reprezentanto de "Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado" kaj Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj. La kunvenon partoprenis ankaŭ: prof. d-ro H. Frank (Eŭropa Klubo), s-ro H. Sonnabend (ILEI), d-ro R. Corsetti kaj s-ino E. Kehlet (UEA), s-ro Z. Tišljar (Internacia Kultura Servo, Jugoslavio), s-ro H. Behrmann (E-Centro Paderborn), s-roj J. Giessner (IFEF), C. Darbellay (ISAE) kaj kelkaj aliaj. Inter la gastoj troviĝis ankaŭ s-ino Yukiko Isobe, direktoro de Japana E-Instituto. Protokolis s-ino Anna Brennan, kiu nun loĝas en Romo kaj prizorgas sekretariajn laborojn por la Jubileo.

La kunveno en Münster rezultis unuavice el renkontiĝo inter s-roj Lapenna kaj Maertens, komence de aprilo ĉi-jare (vidu nian tiumonatan numeron, p.77), sed ankaŭ el pli frue esprimitaj deziroj, ke la Centjara Jubileo unuigu ĉiujn uzantojn de la Internacia Lingvo. Kvar punktojn havis la tagordo en Münster: 1) Konsisto de kupola organiza komitato, 2) Patrona Komitato, 3) Financaj rimedoj, 4) Ĝenerala diskuto pri la Plano por la Jubilea Jaro (aperinta en nia oktobra numero de 1981). Kvankam la kunveno daŭris preskaŭ kvin horojn, la tempo montriĝis nesufiĉa por fintrakti la tagordon. La diskuto, kiun gvidis s-ro Maertens, ĉefe limiĝis al la unua tagorda ero sed ofte tuŝis demandojn ligitajn al la ceteraj tri punktoj.

La kunveno ne faris multajn decidojn, ni supozas i.a. pro la iom nesufiĉa reprezentiĝo de gravaj internaciaj organizaĵoj, kiel ekzemple Sennacieca Asocio Tutmonda. Laŭ nia opinio, la kunveno en Münster estis akcentite eŭropa, eĉ nur okcidenteŭropa, kio ne povas esti sufiĉa bazo por la vastaj tutmondaj planoj pri la Jubileo. Tamen, ni ne volas per tiu rimarko nei la utilecon de la kunveno, des pli ke necesas rigardi ĝin kiel renkontiĝon preskaŭ teknikan – tiajn demandojn ĝi ĉefe traktis –, kiu malfermas vojon al kunlaboro.

Praktika rezulto de la kunveno estas la fondiĝo de laborgrupo, kiu preparos la konsistigon de Internacia Organiza Komitato por la Jubileo. Tiun laborgrupon eniris: s-roj T. Bormann, R. Corsetti, H. Frank, I. Lapenna, G. Maertens kaj H. Sonnabend. Oni planas, ke la grupo kunvenu denove ĉi-jare (eble en Paderborn, en novembro) kaj direktu sian laboron al la celo, ke en la unuaj monatoj de 1983 povu okazi kunveno de la fondota Internacia Organiza Komitato. Tiu komitato traktos i.a. definitivigon de komuna plano por la Jubileo.

La ĉefa rezulto de la kunveno tamen estas la fakto mem, ke ĝi okazis. Temis ja pri refoja praktika atentigo, ke eblas kunlabori por komunaj celoj eĉ kiam oni forte malsamopinias pri unuopaj movadaj demandoj. La kunveno sugestas, ke ni ree komencas kompreni tiun malnovan sloganon – Unueco estas forto! – kaj ke ni estas malmultnombraj por permesi al ni la lukson de malkunlaboro. Estas ankoraŭ frue aserti, ke Münster – konata al ni en Eŭropo pro la "Vestfalia Paco" meze de la 17a jarcento – portis ankaŭ al la internacia Esperanto-movado definitivan pacon. Tamen, la kunveno en Münster klare demonstris, ke vojoj al kunlaboro ekzistas, kaj ke la Centjara Jubileo de Esperanto estas unika okazo por sekvi tiujn vojojn.

Kvin horoj da utilaj opini-interŝanĝoj dum la kunveno fine de majo en Münster (de maldekstre): prof. d-ro Helmar Frank, d-ro Günter Lobin, prof. d-ro Ivo Lapenna, s-ino Anna Brennan, d-ro Renato Corsetti kaj s-ro Grégoire Maertens. En la salono estis ankaŭ dudeko da silentaj observantoj, kiuj ne povis preteratenti la fakton, ke la kunveno disvolviĝis en paca kaj harmonia etoso, kiu daŭris ankaŭ dum la posta festvespero de la 60a Germana Esperanto-Kongreso. (Fotis S. MacGill)

LETERO EL ĈINIO:

Meditoj en pekina pavilono

Dum la lastaj jaroj oftiĝis la vizitoj de eksterlandaj esperantistoj al Ĉinio. Plej ofte temas pri mallongaj turismaj vojaĝoj, kaj ankaŭ la raportoj pri ili nur supraĵe traktas la esencajn demandojn de la Esperanto-movado en tiu vasta lando. Kiel ni jam raportis en nia februara numero (p.24), Geoffrey Sutton el Britio restadas de post oktobro pasintjare en Pekino kaj laboras ĉe Ĉina Esperanto-Ligo. Tial ni petis lin trakti por niaj legantoj kelkajn bazajn problemojn de la nuntempe plej vigla kaj plej amasa landa Esperanto-movado. Jen ĉi-sekve lia unua korespondaĵo.

KIAM MI AŬDIS, ke la ĉinaj aŭtoritatoj akceptis la proponon* inviti la Universalan Kongreson de Esperanto al Pekino en 1986, mi kompreneble tre ĝojis. Mi tamen tuj demandis: "Sed ĉu multaj ĉinoj povos partopreni ĝin?" Tiu demando certe mirigas multajn okcidentanojn, sed pri tio estas granda problemo.

La ĉefcelo de UK estas, aŭ devus esti, stimuli kaj fortikigi la enlandan movadon. Jam de kelkaj jaroj brilas la okuloj de multaj okcidentaj esperantistoj pro la movada ekfloro en Irano, tiel ke la perspektivo de la ĉina movado igas ilin malsobre hurai. Laŭ takso de Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL) nun en Ĉinio lernas Esperanton pli ol kvardek mil homoj. Estas ducent mil interesiĝantoj, kaj pasintjare oni vendis pli ol dudek mil lernilojn. Multaj lokaj societoj eldonis siajn proprajn lernolibrojn.

Aliflanke necesas konscii, ke Ĉinio jam aliĝis al tiuj landoj, kies plej urĝa celo ŝajnas esti lernigi al sia popolo la anglan lingvon. Televide kaj radie oni per pluraj kaj diversaj kursoj, ankaŭ por infanoj, provas instrui la anglan al laŭdire dek milionoj da aŭskultantoj. Ĉinio malfermis sin al la mondo kaj la anglistoj invitite kaj superbuĝete ensaltis kun fervoro. Por realigi la celatan modernigon Ĉinio sendube devas grandskale lerni fremdajn lingvojn, sed nun jam klare mankas sufiĉa atento al aliaj lingvoj.

Kial do tiel multaj ĉinoj eklernas Esperanton? Verdire eĉ ĈEL mem ne estas certa, sed la plimulto kredeble estas allogita de la relativa facileco. Multaj certe forlasos la kursojn, kiam ili ekkonscios, ke ne eblos akiri per scipovo de Esperanto pli bonan profesion, nek ekzistas ankoraŭ multaj teknikaj libroj. Ankaŭ aliaj certe ne restos, se oni ne zorgos instrui ilin pri la neŭtrala, egaleca rolo de Esperanto. Ankaŭ alia granda malfacilo estas la manko de kompetentaj instruistoj.

Laborantoj de ĈEL taksas, ke se dek procentoj de la lernantoj restos en la movado, eblos tre kontenti. Ĉi tiu cifero tamen preskaŭ certe pruviĝos tro optimisma.

Utilas por okcidentano pripensi la situacion de ordinara ĉina esperantisto. Vojaĝi eksterlanden ne eblas (krom ofice, en kiu kazo la registaro pagas ĉiujn kostojn) kaj vojaĝo enlande tre multekostas kaj tial eĉ tio tre maloftas. Loĝado en simpla hotelo dum ekzemple la kongresa semajno en 1986 estus tre peza monŝarĝo, kune kun vojaĝokosto verŝajne nepagebla. Tamen ĉi tion verŝajne faciligos registara subvencio. Akiri eksterlandajn Esperanto-librojn ĝenerale ne eblas, escepte en okazo de malgrandskalaj donacoj. Poŝtmarko por aerpoŝta letero al eksterlando kostas eble sesdekonon de la monata salajro. Mi ne kredas, ke multaj nuntempaj okcidentanoj pretus aliĝi al la Esperanto-movado sub tiaj kondiĉoj. Tamen, kiel iu juna

G. Sutton (dekstre) interparolas kun ĉinaj esperantistoj.

ĉina komencanto diris al mi: "Multaj ĉinaj gejunuloj havas la saman esperon kiel Zamenhof." Kaj vere estas, ke tiuj, kiuj komprenas la celon de Esperanto, tre diligentas.

La renaskiĝanta ĉina Esperanto-movado levas multajn problemojn, kiujn la monda movado devos alfronti plene konsciante, ke eĉ ĉioma fortostreĉo ne sufiĉos. *Plena analiza gramatiko* estis presita en Ĉinio, same kiel estos la kompletigita reeldono de *Esperanta antologio*. Sed la pli vasta problemo de librohavebleco ne povos esti solvita ĉi tiel, nek de laŭokazaj donacoj nek de la kreskanta enlanda ĉina eldonado. Kaj donacoj kaj enlanda eldonado gravegas, sed plej gravas rekoni la potencialon por la monda eldonado. Se eksterlandaj Esperanto-eldonejoj oficiale antaŭproponus al Ĉinio teknikajn, sciencajn librojn en Esperanto je akcepteblaj prezoj (eblaj pro multe pli granda eldonkvanto) estus granda espero, ke la aŭtoritatoj akceptus aĉeti. Sed necesus antaŭprepari kaj kunordigi. British Council** nun faras, do kial ne la Esperanto-movado?

Geoffrey Sutton

---

* Temas pri propono de Ĉina Esperanto-Ligo, kiu sendis al UEA oficialan inviton, ke la 71a UK okazu en 1986 en Pekino. La Estraro de UEA ankoraŭ ne traktis la inviton.

** British Council (Brita Konsilio) estas brita registara institucio, kiu zorgas i.a. pri la disvastigo de la angla lingvo en eksterlando.

FAKA AGADO:

Pli ol 900 komputistoj

ANTAŬ iom pli ol unu jaro fondiĝis la Komputista Sekcio de ISAE. Dum tiu mallonga periodo ĝi jam povas fieri pri grandaj sukcesoj.

En la kampo de perkomputilaj laboroj jam funkcias – por demonstraj celoj – la program-sistemo ESPLORANTO, uzanta Esperanton kiel programadan lingvon. La alia grava rezulto estas la enkomputiligo de la morfemoj de *Plena ilustrita vortaro* (*PIV*). Jam pretas ankaŭ la tekstoanaliza programaro ETAPO, utiliganta la perkomputilan *PIV* por praktikaj celoj. La sukceso de la komputila tradukprogramo el Esperanto germanen ekigis la nun aktualan kampanjon: por ĉiu lingvo verki du programojn, kiuj tradukus al kaj el Esperanto.

Estis organizitaj 6 konferencoj en 5 landoj (Hungario, Pollando, Francio, Ĉeĥoslovakio kaj FR Germanio), kun preskaŭ 300 partoprenantoj el dudeko da landoj. Dum la konferencoj estis prezentitaj 69 prelegoj, el kiuj 40 jam aperis en presita formo. Pasintjare aperis 5 prikomputadaj eldonaĵoj kun suma amplekso 2 700 paĝoj.

Sur tri kontinentoj, en 19 landoj, funkcias landaj reprezentantoj, el kiuj jam preskaŭ ĉiuj orienteŭropaj transformiĝis al komputista instanco (komisiono, sekcio ktp). La fervora laboro de landaj reprezentantoj pri komputado ebligis, interalie, la aperon de ĉ.80 nacilingvaj informaj artikoloj en prikomputadaj periodaĵoj, mobilizon de esperantistoj al fakaj konferencoj (por prelegi kaj partopreni), kolekton de pli ol 900 adresoj de komputistoj-esperantistoj el la tuta mondo. La lasta adresaro estas kompreneble perkomputila kaj jam kvarfoje estis uzata por la tutmonda dissendado de materialoj.

En aprilo estis dissenditaj materialoj pri du gravaj ĉijaraj aranĝoj. Temas pri FAKO-82 (Familia Komputista Marborda Ripoztendaro) kaj INTERKOMPUTO-82 (INTERnacia KOMPUTO-Scienca Simpozio). Jen pliaj detaloj:

FAKO-82 okazos en aŭgusto kaj estos unika provo ligi la feriadon ĉe la bulgara marbordo kun la prikomputadaj fakaj interparoloj. Karakterizaj trajtoj de la aranĝo estas: malmultekosta, ekzotika.

INTERKOMPUTO-82 jam montras kvalitan ŝanĝon en nia scienca kaj faka agado: ĝi estos la unua internacia faka konferenco, organizita fare de neesperantista faka asocio, kies laborlingvo estos sole nur Esperanto. Ĝin organizas Hungara Landa Komputo-Scienca Societo "Johano Neumann", dum la jarŝanĝaj tagoj (82 12 27 – 83 01 02), sub la aŭspicio de Scienca Eldona Centro (SEC) de UEA.

La prezidanto de INTERKOMPUTO-82 estos akademiano Tibor Vámos, prezidanto de la renoma Internacia Aŭtomatiga Asocio (kies konata angla mallongigo estas IFAC). La prezidanto de la Organiza Komisiono estas prof. d-ro Ottó Haszpra, gvidanto de SEC de UEA. Limdato por preleg-alsendoj kaj aliĝoj estas la 10a de septembro (poste la partoprenkotizo altiĝos).

Dum INTERKOMPUTO-82 okazos granda ekspozicio de firmaoj-produktantoj (aparataro, programaro, demonstraj tabuloj, informado ktp). Eblas alveturi kun familio; por familianoj dumtage okazos aparta distra programo; ĉiuvespere esperantlingva teatro; dancado; grandega internacia silvestra balo! Se vi uzas iagrade komputilon kaj ankoraŭ ne ricevis detalajn informojn, tuj petu ilin (Esperante, angle, germane, hungare aŭ ruse) ĉe la organizanto: INTERKOMPUTO-NJSZT, Pf. 240, H-1368 Budapest, Hungario.

D-ro Péter Broczkó

INFORMADO:

Aplaŭdon por BBC!

45-minuta nacilingva radioprogramo pri Esperanto estus trafa informado ĉe kiu ajn radiostacio. Kiam ĝi okazas en la prestiĝa BBC, tio estas kaŭzo por vere fieri kaj gratuli al la prizorgintoj de la programo. Ankaŭ ĉi tiu evento atentigas, ke la informa laboro en la brita Esperanto-movado atingis enviinde altan nivelon. La programo ne provokis nur lavangon da informpetoj sed alportis ankaŭ tridekon da novaj membroj al Esperanto-Asocio de Britujo. Inter ili estas pluraj influaj personecoj de la publika vivo, kiel ekz. la juna Lordo Rugby.

FINFINE priesploro de Esperanto en radioprogramo de BBC (Brita Radio-Korporacio). Vere digna, serioza, justa, detala, interesa. Titolo: Universala lingvo. Dato: la 23an de majo 1982, dimanĉe fruvespere; daŭro: 45 minutoj. Eĉ amuza bildŝerco por atentigi pri ĝi sur la programpaĝo de la eldonaĵo *Radio Times* (Radio-Horaro). Vetero: pluvema, post longa sekeco – do multaj homoj endome por aŭskulti.

Aŭdiĝis la voĉoj de diversaj bone konataj esperantistoj, inkluzive de d-rino Marjorie Boulton (kiel biografo de Zamenhof) kaj d-ro John Wells el la fako pri fonetiko en Universitata Kolegio, Londono, kiu donis tre klaran kaj allogan "lecionon" pri Esperanto.

El la Esperanta Parlamenta Grupo parolis Lordo Brockway (lordo pro merito, ne heredo) kaj Robin Squires, membroj resp. de la socialista kaj konservativa partioj. Robin Squires diris i.a. ke estas aroganteco en la propono, ke ĉiuj lernu la anglan, kaj ke Eŭropo bezonas solvon de sia granda lingva problemo, kiu ne ofendas nacian fieron. Lordo Brockway diris, ke lingvoj pli ol io alia apartigas la popolojn kaj la progreso de Esperanto estas unu el la plej esperdonaj okazaĵoj de la nuna tempo. "La idealisto de hodiaŭ estas la realisto de morgaŭ".

Tre efike subtenis Esperanton la hungara televida raportisto András Sugar, kiu scipovas dek lingvojn kaj

trovas la anglan plejofte nekomprenebla, kiam parolata de alilingvano.

La programo rakontis pri vizitoj al hungara kaj angla lernejoj, pri Esperanta pupteatraĵo kaj pri interparolo kun japan-brita geedza paro, en kiu la geedzoj nur pere de Esperanto havas egalajn ŝancojn venki en argumentado.

Kontraŭis Esperanton lernejestro kaj emerita universitata profesoro, sed la esperantistoj bone respondis al iliaj kritikoj pri "manko de kulturo" ktp.

Fina miraklo – verŝajne necesa por eviti leterojn al BBC – oni donis la adreson de Esperanto-Centro en Londono. Rezulto: multaj miloj da homoj bone informitaj pri Esperanto kaj ĉ. 900 leteroj jam ricevitaj. Ĉiuj skribintoj ricevos i.a. la unuan lecionon de nova, senpaga poŝta kurso. La brita esperantistaro sentas varman dankon al BBC, al la verkinto de la programo Alan Wilding, kaj al Brian Barker, kiu organizis la aferon en la nomo de Esperanto-Asocio de Britujo.

Sybil Sly

FERVOJISTA KONGRESO OKAZIS EN HUNGARIO:

Kio nova en la fervoja mondo?

La 34a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF) okazis en Balatonfüred (Hungario) inter la 2a kaj 8a de majo 1982. Kiel kutime dum la lastaj jaroj, ĉi tiu – post la Universalaj Kongresoj – plej amasa movada renkontiĝo aparte atentis la fakan agadon. Vi konstatos tion ankaŭ el la sekva raporto, kiu kvazaŭ respondas la demandon: Kio nova en la fervoja mondo?

PLI OL 600 fervojistoj (kaj familianoj) el 22 landoj invadis la kongresejon, la SZOT-hotelon kaj sindikatan instru-instituton apud Balatona Lago (Hungario). Ĝia nesufiĉa kapacito – 300 personoj – estigis la unuajn problemojn, sed per endoma televido kaj laŭtparoliloj ĉiuj tamen povis ĉion aŭdi kaj vidi, se ne ĉeesti. La kongresa atmosfero jam komenciĝis ĉe la landlimaj stacioj el ĉiuj najbarlandoj: Esperantaj flagoj apud la ornamaĵoj pro la Unua de Majo, laŭtparolila bonvensaluto, helpopropono fare de deĵorantoj esperantistaj. Specialan trajnon de Budapeŝto al Balatono kaj reen disponigis la Hungaraj Ŝtatfervojoj (MAV) senpage – sed oni tion ne sciis antaŭe, do ĉiuj tamen havis biletojn. . .

Faka laboro elstaris apud la programo distra kaj ekskursa. "Aktualaĵoj el via lando" nomiĝas iniciato de la Fakprelega Komisiono. El la variaj kontribuoj oni eksciis pri jenaj temoj:

– **Trakmodernigaj metodoj** sur ĉefaj kaj duarangaj linioj, en stacioj kaj sur pontoj (H);

– **Manovrostacioj** moderne direktataj per apliko de kibernetiko; rapidecmezurado helpe de radaro; funkcigvidaj kaj procesgvidaj komputoroj (H);

– **Laborkondiĉoj** sur modernaj lokomotivoj, kie la korpo ne plu suferas troan streĉon, sed la nervoj malbone fartas pro senjona aero; eble jonigiloj helpos (H);

– **Kvinjara Plano** en Danlando por la enkonduko de elektra trakcio. Koncernataj estos 1065 relvojaj kilometroj; sur 225 pontoj la liberprofilo estas nesufiĉa; tereno estas akirenda per forhako de tro proksimaj arboj; pasaĝervagonoj bezonos elektrajn hejtilojn (DK);

– **Magnetglita trajno** "Transrapid 06" estos provuzata en Germanio; la veturilo jam pretas, la betona veturvojo preskaŭ (D);

– **Flugkompanio** "Lufthansa" ĉartis 3 motortrajnojn por regule transporti flugpasaĝerojn de Düsseldorf kaj Köln/Bonn al Frankfurto: "Flugo en alteco nul" (D);

– **Ultrasonaj instalaĵoj** helpas forpeli kolombojn el stacidomaj haloj (D);

Speciala trajno por IFEF-kongresanoj en Hungario

– **Bern-Lötschberg-Simplon-fervojo** nun dutrakigos ĉiujn liniopartojn. Necesos du novaj tuneloj kaj kelkaj novaj viaduktoj, por ke iliaj fundamentoj povu porti duan trakon (CH).

Vere domaĝe, ke nur tre malmultaj aŭskultantoj ĉeestis, sed nek la provizora nek la oficiala kongresprogramo (en la 112-paĝa kongreslibro) nek la grafika programplano menciis tiun longe antaŭe planitan programeron!

La ĉefan fakprelegon "La Estonto de la Eŭropaj Fervojoj kaj la rolo de la Hungaraj Ŝtatfervojoj (MAV)" prezentis la aŭtoro, LKK-prezidanto István Gulyás. Surbaze de infrastruktura plano kaj projektita kernreto fare de la Internacia Unio de Fervojoj (UIC), li demonstris la gravan rolon de Hungario pro ĝia geografia situo. Necesos grandaj fortostreĉoj por kontentigi la bezonojn de moderna internacia reltrafiko koncerne la kapaciton de la linioj, vojaĝrapidecon kaj komforton. Post la prelego ne nur la kompleta teksto (kun bele presita kovrilo) estis je dispono, sed eĉ resumoj en la lingvoj Esperanto, germana, franca kaj rusa. La prelegon sekvis "diaporamo" pri la sama temo: du projekciaj aparatoj alterne aŭ samtempe, en rapidega sinsekvo kun variado de la lumforto kaj bildŝanĝo konforme al muzika ritmo, vidigis amason da bonegaj diapozitivoj, pri ĉio de la fervoj-invento ĝis la estontaj magnettrajnoj. Profunda impreso – por kelkaj spektantoj tamen tro progresema, tro laŭta, tro hektika prezentado.

La Terminara Komisiono traktis ĉi-foje aparte malfacilan problemaron: ĉu diri komputoro aŭ komputilo, ĉu datenoj aŭ datumoj, ĉu memorilo aŭ storo, ĉu asemblero aŭ asemblilo aŭ asemblera programo, ĉu bajto aŭ okbito, ĉu diĝita aŭ numera, ĉu duuma aŭ binara, ktp, ktp. Komputoroj enpenetras ĉiujn fakojn kaj faklingvojn kaj la diverslandaj komputoristoj ne trovis interkonsenton bedaŭrinde (laŭ mia opinio pro manko de kompromispreteco). Por la venonta jaro la komisiono antaŭvidas unuafoje du interkongresajn kunvenojn por pli rapide antaŭenigi la traduklaborojn pri la ampleksa leksikono de IUC, kun pli ol 10 000 terminoj.

Tie ĉi mi rezignas priskribi la abundan distran kaj kulturan programon de la kongresa semajno, sed mencias tamen almenaŭ jenajn programerojn: inaŭgura festparolado; honorigo de d-ro Ŝtefano Bácskai per ora medalo; uniformparado; kunsidoj de la komitato kaj komisionoj; akcepto de rezolucio; plantado de arbido; lingvoinstruado kaj fina ekzameno; prelegoj pri arkeologiaj kaj literaturaj temoj koncernantaj Balatonan Lagon; ekumena diservo; kultura vespero kun simfonia koncerto kaj cigana folkloro; balo; ŝippromenado sur Balatona Lago; tri ekskursoj; vingustumado; ekspozicio. Funkciis librovendejo, poŝta giĉeto (specialaj stampo kaj poŝtkarto), radioamatora stacio HA1 KSA2. Postkongreso en Budapeŝto.

Resume: Balatonfüred valoris eĉ la plej longan alvojaĝon.

Ritt

LANDA AGADO:

Kunloĝado en Japanio

Ni transprenas la ĉi-suban raporton el la novaĵbulteno "Japanio aktivas", kiu ekde sia ekapero helpas al ni informiĝi pri la japana E-movado. Ĉi necesas denove atentigi pri la specifa signifo, kiu oni en Japanio donas al la termino "kunloĝado" Temas fakte pri aranĝo simila al tio, kion oni ek en Eŭropo nomus: seminario, renkontiĝo, intens kurso k.s. Oni ankaŭ ekster Japanio "kunloĝas" dum tiaj aranĝoj, mankis nur la talento inventi tiel belan kaj intiman nomon.

La 15a TUTLANDA Kunloĝado de Esperantistoj, organizita de E-Domo en Tokio kaj aŭspiciita de JEI, okazis inter la 1-a kaj 5a de majo 1982, en la Junulara Domo de Yaizu, urbo meze en Japanio.

Ĝin efektive partoprenis 122 (el 143) aliĝintoj (77 viroj kaj 45 virinoj), kies aĝo variis sed estis meze ĉ. 31 jaroj.

En ĉi tiu kunloĝado, en nete 4 noktoj kaj 3,5 tagoj, oni lernis 17 horojn, kio egalas al 2 monatoj en kutima semajna kurso. Lingvolernado okazis en 12 laŭgradaj klasoj sub la gvido de tuta aro da amatoraj sed jam lertaj instruistoj. Aparte okazis infana klaso, en kiu 8 infanoj ĝuis lerni kaj ludi.

Posttagmeza leciono de 4 altnivelaj klasoj estis komuna seminarieto "Kial nun (devas temi pri interesiĝo por, lernado de) Esperanto?", en formo de publika diskuto prezidata de s-ino Kazuko Kikusima. En ĝi la gvidantoj de la koncernaj klasoj kaj s-roj Ulrich Lins kaj Yosikatu Nagase rolis esperantistojn, kaj ĉ.25 lernantoj aktoris neesperantistojn kun amaso da akraj demandoj.

Okazis fakaj kunsidoj de: studentoj, veteranoj, komputistoj, gepatroj kaj gefiloj, edukistoj; funkciis kursoj pri interpretado kaj tajpado; ekzercis koruso. Okazis diskuto pri la ĉi-jara UK-temo "Generaciaj aspektoj de la E-movado".

La dua vespero estis rezervita por prelegoj. S-ro Motohiro Yamasaki, vicprofesoro en la Universitato Sinsyû, parolis pri "Matematikaj esprimoj en Esperanto"; d-ro Ulrich Lins prilumis la temon "E-movado japana kaj eŭropa – Aspektoj similaj kaj kontrastaj". Sub enigma titolo: "Esperanto – lernaĵo, ludilo, lingvo", s-ro Syûiti Yamakawa, interpretisto, analizis la sintenon de japanaj esperantistoj al Esperanto. Laŭ li, por 90% el ili Esperanto estas "lernaĵo". Ili ŝatas "lerni" kaj ne celas "ellerni". Aliflanke, nur 10% havas veran konscion, ke Esperanto estas "lingvo" kaj celas uzi ĝin kiel komunikilon.

Alia specialaĵo de la ĉi-jara kunloĝado estis prezentiĝo en televido. La televida stacio Sizuoka, la 4an de majo, en multe spektata novaĵelsendo elsendis pri nia kunloĝado dum 2,5 minutoj.

Kazuko Kikusima

Ekscita parizaĵo

Regulus, de Lorjak (pseŭd.). Ascoli Piceno: Gabrielli, 1981. 340p. 20cm. Beletra Eldon-Serio 16. Prezo: 32,40 guldenoj.

El inventesplora laboratorio estas ŝtelitaj modelo kaj konstruplanoj de teĥnike revolucia armilo. Samtempe altranga politikisto, kiu subvencias ĝian evoluigadon, estas ostaĝprenita. Familia ŝoko, polico, ĉantaĝa letero. Febra aktiveco torentas.

Sed, se vi nun atendas sekretajn radimesaĝojn, brulantajn helikopterojn kaj televidan apelacion de la papo, vi missupozis. La kvara romano de Lorjak sceniĝas en la deksepajarcenta Parizo. Do imagu spadajn duelojn, portoseĝojn kaj leterkolombojn.

La ostaĝprenintoj postulas sumon tiel altan, ke nur la tuta urba moŝtaro komune kapablas ĝin kolekti. Dume tria flanko klopodas rabi kontraŭostaĝon, iniciato kiu plurfoje alternas inter vero kaj ŝajno. Ĉiuflankaj konspiroj interplektiĝas, gazetaj maldiskretaĵoj perturbas la estiĝintan konfuzon. Ĉio kirliĝas pli kaj pli rapide. Subitaj scenŝanĝoj kondukas al same neatendita kiel harstariga fino.

La romano aperas en la konata lingvoluda stilo de Lorjak. Ĝian francan etoson emfazas ĉiaj francaj esprimoj kaj vortuzoj, sed tiurilate PIV ja estas aparte taŭga helpilo. Tamen, kiu ludas per la lingvo, devus regi ĝin aparte bone. Ĝenas nemalmultaj gramatikaj eraroj, interalie pri **lia/sia**, **de/da**, la uzo de **ĉu** kaj la transitiveco de verboj. Estus cetere bele, se la aŭtoro decidus ne uzi **l'** en prozo, literumi nomojn unuece kaj, apud tiom da esperantigitaj stratnomoj, uzi la esperantan nomon de sia urbo (Kiel oni prononcu **Paris-ano**?).

Malgraŭ ĉio ĉi, jen parizaĵo, kiu fluas vigle kaj atentokapte kaj estas ekscita legaĵo en imprese kaj vive prezentata historia medio, kiun nur iomete truas la ludo per francaj esperantujaj aludoj.

Mi rekomendas ĉi tiun originalan verkaĵon, sed proponas, ke la eldonejo donu rabaton, ĉar ĝi misgvidas la malĉifran atentemon, kiun de la leganto postulas ĉi tiel krea stilo, per tio ke ĝi permesis tian abundon da preseraroj.

Klaus Schubert (FR Germanio)

Kvar prelegoj de Maul

Germana ĵurnalisto komentas; Kvar prelegoj de Stefan Maul en Japanujo. Kun japana traduko de Y. Izumi, Y. Umeda kaj S. Yamakawa. Nagoya: Eldona Societo de Nagoya Esperanto-Centro, 1981. IV+33+V+35p. Ilus. 21cm. Prezo: 13,20 gld.

Unu el la malmultaj vere novaj kaj krome sukcesaj iniciatoj en la Esperanto-movado dum la lasta tempo estis la lanĉo de la revuo *Monato*, per kiu malnova teoria postulo – ke la esperantistoj ne tiom traktadu siajn proprajn problemojn, sed pli multe eluzu la praktikajn avantaĝojn de sia lingvo – fine komencis transformiĝi en realon. Por klarigi sian koncepton kaj varbi abonantojn por sia revuo la ĉefredaktoro de *Monato*, Stefan Maul, komence de la pasinta jaro faris dektagan prelegvojaĝon tra Japanio, dum kiu li parolis al kelkcent personoj. Laŭ la japanaj esperantistoj, kiuj organizis la kunvenojn kaj zorgis pri tradukado, tiu prelegvojaĝo apartenas al la plej sukcesaj iam okazintaj per Esperanto en Japanio.

Legante nun la tekstojn de la kvar prelegoj faritaj de Maul, oni pli bone komprenas, kial la vojaĝo tiel sukcesis. Jen parolis ne iu eŭropa turisto, kiu tedis la japanojn per diapozitivoj pri la lasta UK aŭ sia ĉirkaŭgloba vagado, sed bone informita kaj freŝe interpretanta ĵurnalisto, kiu havas la enviindan kapablon resumi komplikajn problemojn por ĝenerala publiko, kaj prezenti ilin en komprenebla lingvaĵo. Ekzemplo estas la prelego "La timo de la eŭropanoj pri la ekonomia forto de Japanio kaj ĝia konkurenc-premo" – temaro, pri kiu nun ekscitiĝas multaj mensoj, ofte sen la dezirinda baza informiteco. Same aktuala restas "La situacio de Federacia Respubliko Germanio inter la okcidenta kaj orienta ideologiaj blokoj", kiu ankaŭ estis prelegtemo de Maul. Alia prelego, "Problemoj kaj mankoj de la internacia informsistemo", estas interesa provo interrilatigi la strebadon de Unesko al monda "informordo" kaj la publikigon de *Monato*. Kaj fine Maul, la kvazaŭ ekstermovada esperantisto, donas kelkajn personajn vidpunktojn pri "Perspektivoj de la Esperanto-movado", kiujn oni devus preni serioze.

Al la Esperanta originalo estas aldonita ankaŭ japana traduko. Ĝin favore recenzis la amas-ĵurnalo *Asahi sinbun*, esprimante miron pri la esprimkapablo de Esperanto. La gazeto eĉ pli mirus, se ĝi scius, ke profesinivela traktado de politikaj kaj ekonomiaj temoj per Esperanto ankoraŭ estas raraĵo.

Ulrich Lins (Japanio)

Dua poemaro de Urbanová

El subaj fontoj, de Eli Urbanová (1922-). Prago: Ĉeha Esperanto-Asocio, 1981. 95p. Ilus. 21cm. Prezo: 4,80 guldenoj.

Nur nun post 21 jaroj denove aperas poemkolekto de Eli Urbanová. Kiel implicas la titolo, escepte de la versa rakonto "Imagu – tigro!", la poemoj ĉiam esprimas iun tre internan travivaĵon aŭ spertitan senton aŭ penson dum diversaj epokoj de la vivo de la aŭtorino. Tiel "Ombroj de la estinteco" entenas kelkajn epizodojn de ŝia instruistina periodo, sed konstante traplektitajn per ŝiaj samtempaj enmemigoj, atestantaj riĉan internan vivon. "Abismo de ekkono" kunigas kaj malkaŝas tre intimajn sentojn, kiuj la aŭtorinon mem

mirigas kaj timigas. La tria parto "Ringo" enhavas poemojn de nova fazo, iom pli hela ol la antaŭaj. En "Herooj de la zodiako" ŝatantoj de astrologio – kiel ĉiam okazas pri horoskopoj – trovos iun eron ĝuste aplikeblan. La fina parto, "Hinda suito", komenciĝas per "Ĝis ni eliros el grenejo!", kiu sub la preteksto de fabelrakontado rivelas unu el la raraj momentoj de gajeco de la libro, kiel ekzemple la admona interrompo de la rakontantino al la kunulo: *Kara, ni estas sur la strato!*. La finalo "Triopo" estas iom mistika, kvankam travideblas ia sublimiĝo de la antaŭaj, kelkfoje amaraj, kelkfoje tristaj, nur tre malofte ĝojaj sentoj troveblaj en la kolekto.

Min persone ĝenas preseraroj. Krom la tie notitaj, troveblas pliaj en la teksto. Ne nur en ĉi tiu, sed en preskaŭ ĉiuj Esperantaj libroj, afero facile kaj preskaŭ totale eliminebla. La prezento de la libro estas modesta, sed tamen plaĉa: Foto de la aŭtorino (ne nur bela, sed



ankaŭ simpatia), ŝia biografieto kaj modernaj, trafaj ilustraĵoj, kies aŭtoro ne estas menciita.

Dezirindus multe pli da orienteŭropaj eldonaĵoj kiel ĉi tiu por ebligi rektan interŝanĝon inter eldonejoj kaj la akiron de pli da libroj fare de legantoj en landoj kun transpagaj malfacilaĵoj.

L.H. Knoedt (Brazilo)

Kial traduko de traduko?

Juda saĝo. Kompilis Sigvard Feldbaum. El la sveda trad. Leif Gunnar Karlsson (1960-). Aarhus: Dana Esperanto-Eldonejo, 1980. 52p. Ilus. 20cm. ISBN 87 85020 99 0. Prezo: 7,20 gld.

Kvankam unuavide la blua koloro de literoj kaj bildoj impresas iom fremde, tamen jen libreto agrabla por plaĉe foliumi: la ĝenro estas multlingve konata: el plej diversaj epokoj, el Biblio, Talmudo ĝis Albert Einstein kaj Franz Kafka, oni elektis frapajn eldirojn de judaj verkistoj pri tre konataj temoj. Pri judeco aŭ jud-esto, pri saĝo, pri amo, pri **la** homo. Por ĉiu ja io laŭplaĉa, sub la bela moto: "Pripensu la diritan, ne la diranton". Nur du bedaŭroj: kial nur 52 paĝoj? kial tradukita el la sveda traduko?

Isai Sumber

Traduko de klasika ĉefverko

Prometeo ligita (ĉ. 480 a.K.), Esĥilo (525-456 a.K.). El la helena trad. Albert Goodheir (1912-). Glasgow: Eldonejo Kardo, 1982. 54p. 21cm. ISBN 0 905149 16 5. Prezo: 14,40 gld.

Prometeo ligita probable estas la plej enigma tragedio de Esĥilo. Enigmoj naskiĝas jam ĉe analizo de ĝiaj lingvo kaj metriko, certe iom nekutimaj kompare kun la aliaj tragedioj de la sama aŭtoro, kio foje sugestis, ke la teatraĵo estas apokrifa; sed nun tiu supozo ne plu konvinkas helenistojn. Restas tamen granda hezito pri la dato de ĝia surscenigo: laŭ kelkaj, ĝi okazis en 469 a.K., laŭ aliaj pli malfrue, eĉ post la trilogio de Oresto, dum la lastaj vivojaroj de la poeto en Sicilio.

La enhavo de la tragedio estas surprize seneventa kaj relative senmova. Prometeo malobeis al Zeŭso por favori la homojn, al kiuj li donacis la fajron, kaj – ĝenerale – la ilojn por evolui de primitiveco al civilizo. Pro tiu peko, laŭ Zeŭsa ordono, Forto kaj Perforto en la prologo defias Hefeston alkateni lin al rokpinto de Skitio, regiono malproksima, dezerta kaj sovaĝa. Kaj en tiu "vaka sovaĝejo" (kiel diras Forto en la unuaj versoj) dum la tuta tragedio Prometeo grandioze lamentas, filozofias, tamen ĉiam nur parolas, pri la homo kaj la destino; temas pri teatraĵo el nuraj vortoj, sed el vortoj tiaj, kiajn la homaro ne plu aŭdos ĝis Ŝekspiro. Legu, ekzemple, la mirindan priskribon de la homa vivo en la versoj 447-506; aŭ la ĥoraĵojn, kiuj dividas la diversajn epizodojn. – Por konsoli Prometeon, alvenas, sur flugilhava ĉaro, la filinoj de Oceano (ili rolas kiel ĥoro), kaj, pli malfrue, Oceano mem, kiu volus propeti Zeŭson favore al la katenita Titano. Sed Prometeo – iom moke – malkonsilas al li tiun konduton, kaj avertas lin kontraŭ la Zeŭsa kolero. Oceano do foriras, kaj Prometeo rakontas al la ĥoro, kiujn artojn li instruis al la homaro. Subite alvenas sur la scenejon Io, amita de Zeŭso; ŝi, pro la ĵaluzo de Hera, transformiĝis en bovinon. Prometeo antaŭdiras ŝian longan vagadon, kaj – por konsoli ŝin – profetas, ke ankaŭ Zeŭso iam perdos sian povon; nur la Titano mem povus savi lin, sed nur post reakiro de sia libero, dank' al unu el la idoj de Io (fakte Heraklo, nepo de Io post dek tri generacioj, elkatenigos Prometeon). Do, post la foriro de Io, alvenas Hermeso, servisto de Zeŭso, kiu provas elflati la sekreton pri la eltronigo de la dio; sed Prometeo moke kaj memfiere insultas Hermeson kaj rezistas al liaj minacoj. Sekve, Zeŭso punas lin per granda kataklismo, kiu ĵetas la rokojn kaj la alkatenitan Titanon en la abismon.

Tia intrigo – en kiu Zeŭso aperas kiel neakceptebla tirano – certe konsistigas la plej interesan enigmon de ĉi tiu malfacila dramo. El liaj ceteraj tragedioj ni bone scias, ke Esĥilo estis religia homo, kiu kredis, ke la justeco de la dioj estas la unua regulo de la homaj eventoj. Kiel akordigi tiun vidpunkton kun la abomena

despoto, kiu ĉefdias en *Prometeo ligita*? – Eble la solvo ne estas tro malfacila. Tiu ĉi tragedio estas la dua elemento de cetere perdita trilogio, kiu komenciĝis per "Prometeo fajroportanto" (en kiu oni rakontis la malobeon al Zeŭso) kaj finiĝis per "Prometeo liberigita". En ĉi tiu lasta, Heraklo elkatenigis la Titanon, kaj favoris reamikiĝon inter homoj kaj dioj. Ekde la liberigo de Prometeo, Zeŭso regos la universon plej juste kaj feliĉe, kaj vere meritos la kortuŝe grandiozajn laŭdojn, kiujn la ĥoro recitas komence de "Agamemnono". En la helena pensmaniero, dioj – kiel homoj – evoluas; Esĥilo, konsidere de tiu progreso, respektis Zeŭson kaj en "Prometeo" kaj en "Agamemnono" (malgraŭ tiom da ŝajnaj diferencoj), kaj romantikuloj certe miskomprenis lin, kredante, ke li volis prezenti heroan lukton de la homoj kontraŭ supera potenco. – Iom similan eraron montras la kovrilo de ĉi tiu traduko, kiu surhavas bildon de (supozeble) nazia koncentrejo. Kompari Zeŭson kun nazio certe estus laŭ Esĥilo plej abomeninda blasfemo kontraŭ tiu justa dio, kies nomon la maljunaj argolandanoj en "Agamemnono" eĉ ne kuraĝis prononci.

La traduko estas tre bona, kvankam d-ro Goodheir eble konsentos, ke traduko el la helena neniam povas tute kontentige sukcesi. Modernaj lingvoj ĉiam sonas tro malriĉaj por taŭge esprimi la originalon. Mi provis poverse kompari la esĥilan tekston kun ĉi tiu traduko, kaj, kvankam admire pro la granda fideleco, mi ja bedaŭris la trosimpligon de kelkaj esprimoj. – Nur unu ekzemplo: en verso 134 de la originalo unu el la filinoj de Oceano klarigas sian alvenon dirante, ke "la eĥo (de ferbatado) forpelis mian pudor-okulan hontemon"; la traduko tekstas nur "kiam sono de ferbatado vokis eĥon, ni, **ne plu timeme** . . .", kio ŝajnas evidenta simpligo de tiu kompleksa esprimo. – Aliflanke, la lingvouzo estas tre eleganta, kaj eĉ la nombron de la versoj la traduko fidele imitas (sed kial versoj 88-92 estas tradukitaj ĥorece, se ili estas normalaj jambaj trimetroj?). Do, ĝenerale altnivela rezulto, kiun igus eĉ pli valora la alfrontigo de la originala teksto.

Resume: la volumo estas nepre aĉetinda. Ne maltrafu la okazon havi surbrete tiun ĉi Esperantan eldonon de Esĥilo, la plej granda helena tragediverkisto, senelĉerpa fonto de ĝuo kaj admiro.

Mauro Nervi (Italio)

Universaleco de la satira ĝenro

Elektitaj satiroj, de Efraim Kiŝon (1924-). Tradukis Gerhard Ziegler. Gerlingen-Stuttgart: Bleicher Eldonejo, 1981. 111p. 19cm. ISBN 3 88350 502 1. Prezo: 16,80 guldenoj.

Israelo estas lando, pri kiu oni ne rajtas ne havi opinion. Tiuj opinioj estas ĉe malsamaj homoj radikale malsamaj kaj bedaŭrinde la situacio ne montras pliboniĝon por la baldaŭa estonteco. Tamen, ĉiu nuntempulo iam interesiĝis pri la fenomeno Israelo kaj deziris scii plie pri la israela socio, iel arte kreita per kunmetado de homoj venantaj el almenaŭ tiom da landoj, kiom estas la landoj, en kiuj ĉi tiu revuo estas legata.

Efraim Kiŝon estas la israela verkisto, kiu pleje kontribuis al diskonigo de tiu socio al la ĝenerala eksterlanda publiko. Sendube multaj el la legantoj jam renkontis kelkajn el liaj libroj en nacilingvaj eldonoj. Nun la tradukinto kaj la eldoninto finfine permesas ankaŭ al parolantoj de la Internacia Lingvo ĝui la satirojn de Kiŝon. Tiuj satiroj estas samtempe tre efika ilo por konigi la ĉiutagan etoson en Tel-Avivo, la problemojn de normalaj homoj (kies socio jam tiel evoluis, ke ili estas devigataj lukti kun senkompataj komputiloj de la financministerio), kun saltetantaj lavmaŝinoj, kun tre homaj (kaj ofte ĝenaj kiel nur homecaj homoj kapablas esti) najbaroj. Tiu etoso, kune kun la satiroj pri bibliaj temoj (La juĝo de Salomono – dua instanco en ĉi tiu kolekto), estas por mi la plej interesa faceto de la verkoj de Kiŝon (sur la ĉi-kuna foto).



Preter la israeleco, tamen, Kiŝon estus, laŭ mia opinio, legata ankaŭ se li verkus satirojn pri malpli ekzotika socio. Fakte lia humuro apartenas al ĝenro tute komprenebla kaj kutima en, ekzemple, latinidaj landoj.

Estus iam interese studi la reagojn de diverslandaj esperantistoj al diversdevenaj humur-stiloj. Mi riskas intuicii, ke Kiŝon estus inter la plej kompreneblaj aŭtoroj, ĉar liaj temoj (ordinaraj problemoj de ordinaraj homoj) estas tutmonde renkonteblaj.

Mi ne estas konvinkita ke, laŭ la aserto de la eldonisto, oni elektis por ĉi tiu libro "la plej belajn rakontojn", kaj mi pensas pri la pluraj rakontoj pri lingvaj kaj kulturaj problemoj kaŭzataj de la "multnacieco" de Israelo. Ilin esperantistoj certe multe ŝatus. Ĉu Ziegler baldaŭ same flue tradukos duan volumon?

Renato Corsetti (Italio)

La aŭtoro meritas pli

La konduto de Grandsinjoro Tadanao (1918) kaj **Balotado** (1921), de Kan Kikuĉi (1888-1948). Trad. el la japana Ŝiger Ujeki. Tokio: Zamenhof-Klubo, 1981. 75 + 6p. 18cm. (Kun du mapoj). Prezo: 15,60 gld.

Ĉe sia debuto en 1917, Kikuĉi estis sub relative forta influo de anglaj aŭtoroj, precipe de Shaw kaj Galsworthy. Tiu influo konstateblas ĉe ambaŭ ĉi tiuj rakontoj. Eble tio faros ilin allogaj por eŭropanoj: ĉar, kvankam la Grandsinjoro Tadanao mem ja plene apartenas al japana historio kaj kvankam la abunda harakirado malfremdas nur en japana tradicio – tamen la rakonta maniero de Kikuĉi estas multe pli eŭropeca ol kutime ĉe tiuj japanaj aŭtoroj, kies verkojn mi ĝis nun legis. Li havas tre klaran kaj rapidagan prezentmanieron pri la okazaĵoj.

La unua rakonto montras eksceson, kaŭzitan de plej absoluta potenco: la Grandsinjoro mem subite – je sia konfuziĝo – ekkonscias, ke al li neniel eblas pure **home** rilati al kiu ajn, ĉar ĉiuj vidas en li nur sian mastron, nur la altrangulon. Amon li sopiras, obeemon li renkontas. En siaj provoj – pli kaj pli frenezaj – por tamen iel veki "homajn" reagojn, li estas vere tragika. Sed la harakirada ofteco por mi restas absolute nekomprenebla! La dua rakonto ankaŭ en la japana ne estas tiel konata: tamen trafe vortita anekdoto el heroa epizodo.

Sed ege mi bedaŭras, ke ĉi tiun simpatian verketon makulas grandnombro da preseraroj: en 50 paĝoj mi nombris pli ol 40 da ili (aldone al 30 indikitaj sur aldonita korektofolio). Krome, kvankam ĝenerale la traduko tre flue legiĝas, tri/kvar frazoj estas tiel torditaj, ke ili impresas min kvazaŭ mallerta traduko el la klasika helena aŭ latina: ekz. sur la p. 26: "Li sentis sin kvazaŭ surtretita al si la kapon per kotaj piedoj" (= Li sentis sin, kvazaŭ per kotaj piedoj oni surtretus lian kapon). Tiajn frazojn oni nepre ne presigu. La aŭtoro tion ne meritas.

Gerrit Berveling (Nederlando)

Kontraŭmilita bildstria romano

Nudpieda Gen (1973), de Keizi Nakazawa. El la japana tradukis Yukio Izumi (1959-). Tokio: Rondo Gen, 1982. 4+284p. Ilus. de la aŭtoro. 21cm. Prezo: 30,00 guldenoj.

La jaro 1945 ne estas facila por la familio Nakaoka. Regas ĝenerala malsato. La najbaroj rifuzas plu helpi al la familio, pro la skandale malpatriotisma konduto de la patro, kiu eĉ aŭdacas furzi ĉe siaj devigaj lanc-ekzercadoj. La antaŭlasta el liaj kvin gefiloj, la ruza, petolema knabo Gen, dividas kun la patro ties kontraŭmilitismon – kelkfoje. Sed kiam aliaj knaboj nomas lin kaj lian familion perfiduloj, li sub la premo de kontraŭdiraj aŭtoritatoj petegas la patron esti bona japano, kaj promesas mem mortigi amasojn da usonanoj kaj britoj kiam li sufiĉe kreskos. Antaŭ la fino de ĉi tiu volumo (la unua el jam sep en la japana, kiuj kolektas ĉi tiun ankoraŭ nefinitan bildstrian felietonon), la amara sperto hardas la primilitajn opiniojn de Gen – ĉar familio Nakaoka loĝas en Hirošimo.

Ne temas nur pri Gen. La leganto konatiĝas kun ĉiu familiano kaj ankaŭ kun kelkaj aliaj, sed ĉefe kun la japana socio tiutempa, kun reganta spirito de sinmortige fanatika adoro por apenaŭ konata imperiestro.

Mem perdinte familianojn en la hirošima hekatombo, Nakazawa verkas unuavice por japanoj, por ilin eduki kontraŭ ĉia ajn militfervoro, kaj sekve kritikas eksklu-



zive (almenaŭ ĉi-volume) la japanan socion. La mesaĝo tamen estas universala.

En Japanio, pli ol en okcidentaj landoj, bildstrioj ĝuas amasan popularecon ĉe ĉiuj generacioj, do ne estas surprize, ke *Nudpieda Gen* plurrilate aspektas la plej matura tia verko (krom, eventuale, la surrealisma originalaĵo *Noktoj* de Sire) aperinta en la Internacia Lingvo. Humuro ne forestas, sed ĝi celas elvoki ne nur ridojn. La desegnado impresas ofte tro karikatura, laŭ okcidentaj normoj, por rakonto tiel serioza, sed kelka alkutimiĝo sufiĉas por forigi tiun senton.

La traduko estas konciza kaj suka, kun viveca, natura dialogo kaj lerte elektitaj onomatopeoj. Ĉefa inter la tre malmultaj misaĵoj estas la esprimo "voki iun perfidulo" (anst. "nomi . . .").

Indas averti, ke la japana esperantista merkato plurfoje en la pasinteco montriĝis konsterne kapabla forsorbi la proprajn produktaĵojn, kaj ke – laŭ raportoj – la Esperanta traduko ĝuas ankaŭ ĉe la ĝenerala japana publiko kelkan vendiĝon, post raportoj pri ĝi en dekoj da ĵurnaloj. Al gratulo al Rondo Gen pro konscience farita laboro devas aldoniĝi espero, ke esperantistoj povu ankoraŭ konatiĝi kun la plua historio de Gen kaj de tiuj liaj familianoj, kiuj postvivas la atombombon.

Charles R.L. Power (Usono)

Laste aperis . . .

Angoro; Poemaro, Karolo Piĉ (1920-). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1982. 97p. 20cm. Lirikaj poemoj, metrike simplaj, lingve ne ĉiam. Temaro ama kaj socia. Prezo: 22,20 gld.

Apologio (197 p.K.), Tertuliano (ĉ. 153-ĉ. 222 p.K.). El la latina tradukis (1980) Gerrit Berveling. Vlaardingen: VoKo, 1982, (2a plene tralaborita eldono). 116p. Unu mapo. 21cm. Voĉoj kristanaj n-ro 2. Fama verko, kiu defendas la kristanismon kontraŭ paganismo kaj judaismo. Tertuliano estas la unua, kaj kun Aŭgusteno la plej granda antikva kristana aŭtoro. Prezo: 9,90 guldenoj.

Aventuroj de Ŝpar- kaj alia porketoj, La, Rik de Roover. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1982. 80p. Ilus. de Kris de Roover. 21cm. Romaneto por geknaboj; katolika etoso; facile legebla. Prezo: 12,00 gld.

Besto-farmo, La (1945), George Orwell (1903-1950). El la angla trad. (1970) Gerald Tucker. Munkeno: Eldonentrepreno Lanterno, 1982 (ne indikite, 2a eld). 108p. Ilus. 17cm. Politika fablo pri revolucio kaj ties sekvoj. Prezo: 14,40 gld.

Blanka sablo. Diversaj aŭtoroj. El la vjetnama trad. Nguyen Minh Kinh kaj Dang Dinh Dam. Hanojo: Fremdlingva Eldonejo, 1981. 55p. Ilus. 16cm. Kolekto Hibisko. Prezo: 3,00 gld.

Boule de suif (1880) Guy de Maupassant (1840-1893). El la franca tradukis Fernando de Diego. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1982. 59p. 20cm. Belstila rakonto de unu el la ĉefaj reprezentantoj de la naturalisma skolo en la franca literaturo. Maupassant ankoraŭ ĝuas mondan famon kiel granda rakontomajstro. Kun enkonduka eseeto de G. Waringhien. Prezo: 18,00 gld.

Curie: **Vivo de Pierre Curie**, A. da Silva. El la portugala trad. M. de Freitas. Porto: Portugala Eldona Rondo, 1982. 21p. Mimeo. 21cm. Kulturklerigaj kajeroj n-ro 9. Prezo: 1,20 gld.

El la valo, Tyburcjusz Tyblewski (1932-). Jelenia Gora: La aŭtoro, 1981. 134p. Ilus. 20cm. Rakontoj, eseoj kaj poemoj, originalaj kaj tradukaj (i.a. de la famaj polaj poetoj Różewicz kaj Miłosz). Prezo: 16,20 gld.

Esperanto, El (1973), Pierre Janton. El la franca trad. Damià de Bas, 1976. Vilassar de Mar/Barcelona: Oikos-Tau, 1976. 143p. 17cm. Collección Qué sé? Nueva serie n-ro 113. ISBN 84 281 0306 2. Traduko de la plej aŭtoritata nacilingva informlibro pri Esperanto, ĝiaj movado, historio kaj beletro. Prezo: 9,90 gld.

Esperanto Movement, The, Peter G. Forster (1944-). Den Haag/Paris/New York: Mouton Publishers, 1982. 14+413p. 23cm. Contributions to the Sociology of Language n-ro 32. ISBN 90 279 3399 5. Ĝenerala sociologia studo pri Esperanto kaj ties historio; funda en sia argumentado, aŭtoritata en siaj juĝoj; la plej ampleksa nacilingva studo pri Esperanto. Prezo: 33,90 gld.

Germana ĵurnalisto komentas; Kvar prelegoj de Stefan Maul en Japanujo, Stefan Maul (1940-). Nagoya: Eldona Societo de Nagoya Esperanto-Centro, 1981. 4+33+5+35p. Ilus. 21cm. Dulingva eldono: Esperanta-japana. Japana traduko de Y. Izumi, Y. Umeda kaj S. Yamakawa. La prelegoj temas pri politiko, komunikado, ekonomio kaj la Esperanto-movado. Prezo: 13,20 gld.

"Hai Son" Floroj, Dang Ai k.a. El la vjetnama trad. Minh Kinh. Hanojo: Fremdlingva Eldonejo, 1981. 71p. 16cm. Kolekto Hibisko. Prezo: 3,00 gld.

Herculano: **Vivo de Alexandre Herculano**, A. da Silva. El la portugala trad. M. de Freitas. Porto: Portugala Eldona Rondo, 1982. 19p. 21cm. Mimeo. Pri la plej granda portugala historiisto, kiu vivis en la 19a jarcento. Prezo: 1,20 gld.

Hieraŭ – hodiaŭ – morgaŭ; Noveloj, Bernard Golden (1925-). Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1982. 96p. 21cm. ISBN 90 6336 022 3. Dek du rakontoj originale verkitaj en Esperanto, pluraj premiitaj en la Belartaj Konkursoj de UEA. Prezo: 12,00 guldenoj.

Ho ve, miaj ŝuoj! Georg Fröschel. El la germana trad. Britta Lindeberg (1917-). Malmö: Eldona Societo Esperanto, 1981. 58p. Ilus. 19cm. ISBN 91 85288 04 7. Ĉarma rakonto pri travivaĵoj de komercisto pri diamantoj. Bela traduko, eleganta eldono. Prezo: 12,90 gld.

Japanaj noveloj, Katue Yuasa (1910-194?) kaj Tagashi Nagatuka (1879-1915). El la japana tradukis Syuzi Matuda (1914-1981). Kanazawa: Hisako Matuda, 1981. 89p. Ilus. 21cm. Bind. La volumo enhavas du longajn rakontojn: "Migranto" kaj "Tazyu kaj lia hundo". Prezo: 15,00 gld.

Jovkov: **Jordan Jovkov, 1880-1937-1980**, Petâr Dinekov k.a. El la bulgara trad. K. Vâlev k.a. Tolbuhin: Esperanto-Societo "Paco", 1980. 23p. Mimeo. 20cm. Prezo: 3,00 gld.

Kiu estas kiu en scienco kaj tekniko 1981, kompilis Christian Darbellay. Neuss: La aŭtoro, 1981. Ilus. 275p. 21cm. Biografiaj kaj bibliografiaj informoj pri 225 sciencistoj kaj teknikistoj, kiuj uzas Esperanton. Plejofte kun fotoj kaj adresoj. Prezo: 33,30 guldenoj.

Liberté ou autorité dans l'évolution de l'espéranto, François Lo Jacomo (1954-). Parizo: La aŭtoro, 1981. 384p. 24cm. "Libereco aŭ aŭtoritato en la evoluo de Esperanto" estas esperantologia studo pere de kiu la aŭtoro doktoriĝis ĉe la pariza universitato Sorbono en 1981. Prezo: 39,00 gld.

Miriadoj da lumoj. Diversaj aŭtoroj. El la vjetnama trad. Nguyen Minh Kinh kaj Dang Dinh Dam. Hanojo: Fremdlingva Eldonejo, 1981. 61p. Ilus. 16cm. Kolekto Hibisko. Prezo: 3,00 gld.

Misio sen alveno, John Francis (1924-). Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1982. 159p. 21cm. ISBN 90 6336 021 5. Originala romano, sciencfikcia, de la aŭtoro kiu fariĝis konata pro siaj antaŭaj verkoj: la novelaro *Vitralo* (1960) kaj la romano *La granda kaldrono* (1978). Prezo: 24,- gld.

Proverboj de Marko Zamenhof kaj de Lazaro Zamenhof; (13 155 proverboj). Kompilis Adolf Holzhaus. Helsinki: Fondumo Esperanto, 1980. 704p. 21cm. ISBN 951 9005 47 1. Plena kolekto de la zamenhofa proverbaro, alfabete ordigita, en Esperanto, franca, germana, pola kaj rusa lingvoj, kun indeksoj. Prezo: 60,90 guldenoj.

Provo de gramatiko de novjuda lingvo (ĉ. 1880) kaj **Alvoko al la juda intelektularo** (ĉ. 1901), L.L. Zamenhof. El la rusa trad. J. Kohen-Cedek kaj A. Holzhaus. Redaktis A. Holzhaus. Helsinki: Fondumo Esperanto, 1982. 159p. 21cm. ISBN 951 9005 48 X. Dulingva eldono: rusa kaj Esperanta. Enestas ankaŭ letero de Zamenhof al J.M. Schleyer kaj la teksto de la broŝureto de Schleyer "Pri la fuŝlingvo de la pseŭdo-Esperanto", ambaŭ en Esperanto kaj la germana. Kun indekso. Prezo: 14,40 gld.

Sciencaj prelegoj; 3a Internacia Medicina Esperanto-Konferenco. Diversaj aŭtoroj. Ruse: Universala Medicina Esperanto-Asocio, 1981. 203p. Ilus. 20cm. Kvindeko da prelegoj, ĉefe medicinaj. Prezo: 9,- gld.

Tri mortoj, Leo Tolstoj (1828-1910). El la rusa trad. M. Ŝidlovskaja. Japana represo de la eldono el 1911. Paris: Presa Esperantista Societo. 35p. 21cm. Enestas ankaŭ la teksto de Tolstoj "Prudento aŭ kredo?" kaj la studo "Tolstoj kaj Esperanto", represita el *Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro* (1960). Prezo: 3,00 guldenoj.

Unu tago post la alia; Letero al infano naskita, Clelia Conterno Guglielminetti (1915-). El la itala trad. Roger Bernard. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1982. 135p. 21cm. Pasia taglibra rakonto pri angoroj kaj sopiroj de patriniĝo en la postmilita Eŭropo. El la plumo de la jam fama Esperanta verkistino kaj akademianino. Prezo: 36,30 gld.

Van Gogh: **Vivo kaj arto de Van Gogh**, A. da Silva. El la portugala trad. M. de Freitas. Porto: Portugala Eldona Rondo, 1982. 24p. Mimeo. 21cm. Kulturklerigaj kajeroj n-ro 11. Prezo: 1,20 guldenoj.

Vojaĝoj de Kolumbo, La, A. da Silva. El la portugala trad. M. de Freitas. Porto: Portugala Eldona Rondo, 1982. 23p. 21cm. Mimeo. Prezo: 1,20 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4, kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18 procentoj por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas sendokostoj: por la mendoj sub la valoro de 200 guldenoj – 20 procentoj, por la mendoj super 200 guldenoj – 10 procentoj. Minimumaj sendokostoj estas 5,00 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

EKSTERAJ RILATOJ DE TEJO:

Prepare al IJJ en 1985

INTER la 11a kaj 14a de majo 1982, okazis en Ĝenevo (Svislando) la 53a Ĝeneva Neformala Kunveno de Internaciaj Neregistaraj Junularaj Organizaĵoj (ĜNK) kaj, lige al ĝi, seminario pri la problemoj de junulara senlaboreco. La seminarion organizis ĜNK kunlabore kun Internacia Labororganizo (ILO) kaj UN-Centro pri Socievoluaj kaj Homaraj Aferoj (UNCSDHA). En ambaŭ aranĝoj TEJO-n reprezentis Martin Haase (FR Germanio).

ĜNK estas kunveno de la plej gravaj internaciaj neregistaraj junularaj organizaĵoj, por interŝanĝi informojn kaj por konsultiĝi kun reprezentantoj de UN kaj de ties specialigitaj organizaĵoj. En unu el siaj rezolucioj, la Ĝenerala Asembleo de UN deklaris, ke "ĜNK estas la plej grava informkanalo inter junularaj organizaĵoj kaj la UN-sistemo". ĜNK sesias trifoje jare, sed malgraŭ sia nomo ne ĉiam en Ĝenevo.

Ĝia 53a kunsido estis speciale grava por TEJO. Pro tio, ke nia organizaĵo estis la protokolanto de la antaŭa sesio, TEJO estis unu el la afergvidantoj de la preparlaboroj por tiu ĉi kunveno, kies ĉefa tasko estis la kunordigo de la preparoj por la Internacia Jaro de la Junularo (IJJ) en 1985, proklamita de UN. Tiuj, kiuj atente sekvas la agadon de la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER) de TEJO, ja scias, ke KER aparte atentas la planadon de aktivecoj por tiu jaro.

IJJ havas tri subtemojn: partopreno, evoluo kaj paco. Unuavide tiuj temoj ne ŝajnas rilati precipe al la junularo. Tamen ili ne nur interesas gejunulojn, sed ofte rekte koncernas ilin. Ni ne forgesu, ke la socioj de triamondaj landoj estas esence junaj, ĉar pli ol la duono de ilia loĝantaro aĝas malpli ol tridek jarojn. Tiuj gejunuloj postulas pli grandan socian kaj politikan partoprenon kaj akcelitan ekonomian evoluon. Ilia batalo por pli justa ekonomia, socia kaj politika ordo respeguliĝas en la solidareco de granda parto de la junularo en evoluintaj landoj. Paralele, gejunuloj en ĉiu mondparto konsciiĝis lastatempe pri la problemo de paco. Tial la subtemoj ne estis hazarde elektitaj.

Dum la venontaj jaroj ĜNK traktos diversajn aspektojn de la subtemoj en specialaj seminarioj, kolokvoj ktp. Poste, en 1985 mem, la rezultoj estos resumitaj en po unu fina konferenco pri ĉiu subtemo. Ankaŭ la organizaĵoj-membroj de ĜNK estas kompreneble alvokitaj atenti la temojn de IJJ. Ke TEJO tion faras, pruvas la temoj de ĝiaj KER-seminarioj, sed ankaŭ la temoj de pluraj aranĝoj okazantaj je la nacia nivelo, kiel ekzemple la Internaciaj Seminarioj de Germana Esperanto-Junularo. Dank' al la engaĝiteco de TEJO en ĜNK kaj precipe en la planado de IJJ, UN-Junularfako ekde nun intencas regule transpreni interesajn artikolojn el nia informilo NNN en sian junularan informan bultenon, kiu, aperante kvarfoje jare en la angla, franca kaj hispana, estas sendata al ĉiuj gravaj organizaĵoj, instancoj kaj unuopuloj, kiuj rilatas al la laboro de junulara fako de UN.

Post la ĜNK-sesio, okazis la seminario pri junulara senlaboreco. Ĝin partoprenis ne nur reprezentantoj de ĜNK-membroj kaj de UN-organizaĵoj, sed ankaŭ fakuloj de sindikatoj kaj ILO. En la kadro de tiu aranĝo TEJO plurfoje havis la eblecon atentigi pri la problemo de lingva diskriminacio rilate la temon. Vidiĝis, ke aliaj junularaj organizaĵoj same konscias pri tiu problemo. TEJO ankaŭ prezentis siajn tiurilatajn aktivecojn, kiuj bedaŭrinde limiĝas al seminarioj kaj similaj aranĝoj ĉefe en la evoluinta parto de la mondo, dum la problemo de senlaboreco estas precipe grava en la Tria Mondo, kie tamen jam agadas individuaj parolantoj de Esperanto, kiel ekzemple, en "Bona Espero" (Brazilo), kiu estis menciita en Ĝenevo.

Oni povas sin demandi, kiu estas la rilato inter la neŭtrala lingvo Esperanto kaj la problemo de senlaboreco, sed jam la Deklaracio de Tyresö konstatis en la jaro 1969, ke "lingvo estas realaĵo intime ligita al sociaj kaj politikaj fenomenoj."

Martin Haase

Laŭ lastmomentaj informoj, la 38a Internacia Kongreso de TEJO, en Loveno (Belgio), jam havas 200 aliĝintojn. Tio signifas, ke ĝi montriĝos esti granda, ĉar multaj gejunuloj kutimas aliĝi nur post la alveno en la kongresan urbon.

SEMINARIO EN HUNGARIO:

Homaj loĝlokoj

ĈI-JARE la Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazos dum la unua semajno de aŭgusto en Loveno, Belgio. Multaj gejunuloj partoprenos ĝin sed multaj aliaj ne. Sed du semajnojn poste, en Hungario, okazos alia aranĝo de TEJO, kiun ili povus partopreni – la seminario de TEJO kaj la hungara organizaĵo Interfaka Scienca Studenta Rondo, en Szentendre (apud Budapeŝto). La seminario, kies temo estas "Homaj loĝlokoj – hodiaŭ kaj morgaŭ", okazos inter la 15a kaj 22a de aŭgusto en tiu bela urbo, konata pro sia diversstila arkitekturo kaj multaj muzeoj. Estos kotizo de 150 guldenoj, de kiu 20 gld. estas antaŭpagendaj al la Centra Oficejo en Roterdamo. Dank' al subvencio de Eŭropa Junulara Fondaĵo (EJF), trajnaj vojaĝkostoj en eŭropaj landoj estas duone repageblaj, kaj junaj laborantoj povas ricevi salajrokompenson de EJF. Por pliaj detaloj turnu vin al via landa sekcio aŭ al TEJO: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam. Homoj el netranspagipovaj landoj turnu sin al: TEJO/KSA, Pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario.

psh

Soveta Unio

• Ĉe la eldonejo "Nauka" (Scienco) en Moskvo antaŭnelonge aperis la verko *Jazyk esperanto* (La lingvo Esperanto) de prof. M.I. Isajev. La 86-paĝa libro (eldonita en 5 000 ekzempleroj) estas detala ruslingva priskribo de la lingvo, simile kiel la verko *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto* de J.C. Wells. Sonas iom strange, ke la verko de prof. Isajev aperis en la serio "Lingvoj de la popoloj de Azio kaj Afriko", sed enkonduka noto asertas, ke la lingvo estas "disvastigita en la Oriento ne malpli ol en la Okcidento". La libro de Isajev certe estas la plej kompleta kaj la plej aŭtoritata informilo pri Esperanto en la rusa lingvo.

Nikaragvo

• Ni ricevis informojn, ke Nikaragva Esperanto-Ligo, fondita en oktobro pasintjare, bone progresas kaj daŭre kreskas. Ĝiaj membroj vivantaj en la ĉefurbo Managvo kunvenas dufoje monate. Okazas tie nova Esperanto-kurso kaj gejunuloj fondis apartan grupeton. Konstante sentiĝas la manko de hispanlingvaj Esperanto-lerniloj. Adreso: Nikaragva Esperanto-Ligo, Apartado 1889, Managua, Nikaragvo.

Srilanko

• En la lastaj jaroj kreiĝis aktiva Esperanto-grupo en la ĉefurbo Kolombo. La grupo aparte bonvenigas personajn kontaktojn kun esperantistoj, kiuj turisme vizitas ĉi tiun azian landon. Skribu al la gvidanto de la grupo: s-ro D.B. Jesudason, 71 Pagoda Road, Nugegoda, Srilanko. S-ro Jesudason estas emerita lernejestro kaj loĝas je 12-kilometra distanco de Kolombo; lia telefonnumero estas 552185.

Aŭstrio

• La 14a Trilanda E-Konferenco (Aŭstrio, Italio, Jugoslavio) okazos ĉi-jare inter la 10a kaj 12a de septembro en Pöckau apud Arnoldstein, ĝuste tie, kie renkontiĝas la limoj de la tri landoj. Kiel konferencejo servos "Grenzlandhof", kiun la informilo de la Konferenco priskribas kiel "trilingvan gastejon". Kune kun simila trilanda renkontiĝo inter Germanio, Belgio kaj Nederlando, ĉi tiu Konferenco en Pöckau apartenas al la plej popularaj movadaj kunvenoj en Eŭropo, i.a. pro la fakto, ke renkontiĝas la parolantoj de ĝermana, romanida kaj slava lingvoj, kaj ke Esperanto plene montras siajn avantaĝojn. Informadreso: Martin Stuppnig, Esperanto-Str. 175, A-9601 Arnoldstein, Aŭstrio.

Japanio

• *Tokio sinbun*, japana ĉefurba ĵurnalo (eldonkvanto: 625 000 ekz), en siaj kvin sinsekvaj numeroj dum aprilo aperigis tre ampleksan ilustritan felietonon pri s-ino Kimie Markarian el Shenfield (Britio). Granda atento en la felietono estis dediĉita al la esperantisteco de s-ino Markarian, japandevena instruistino pri sorobano (japana mankalkula arto), pli ol jardekon vivanta en Britio. Dum sia restado en Tokio, s-ino Markarian ankaŭ prelegis ĉe Japana Esperanto-Instituto.

Kuvajto

• Kelkaj novuloj lernas Esperanton tie. Informas s-ro Al-Amily (antaŭe en Irako). Helpas s-ino N. Hasegawa, japanino nun loĝanta en Kuvajto.

• **Francio: Unu el la plej grandaj ĝisnunaj "infanaj kongresetoj" okazis inter la 4a kaj 11a de aprilo ĉi-jare en la Esperantista Kulturdomo Grésillon. Dum tiu semajno en la populara kastelo kolektiĝis pli ol 60 infanoj el Danlando, FR Germanio kaj Francio. Estis samtempe tie ankaŭ kelkdeko da plenkreskuloj, sed ili ne gravas ĉi-foje. La infanoj diligentis ĉiumatene en kvin diversnaciaj klasoj. Vi ja vidas, ke ili multon lernis, ĉar jen — ĉiu volas respondi, kiel pruvas la ĉi-supra foto, sendita al ni de s-ro Frédéric Le Magadure (la ĉefa organizanto de la tre sukcesa infana renkontiĝo en Grésillon).**

Fake

Kongresoj

• La Kongresa Libro de la 67a UK en Antverpeno ne estos ekspedita poŝte al la kongresanoj, sed liverita en la akceptejo ĉe la alveno al la Kongreso mem. Kvankam la oficiala programo komenciĝos sabaton (la 24an de julio), oni bonvolu noti, ke kelkaj kunsidoj okazos jam vendredon (Komitato kaj komisionoj) kaj eĉ ĵaŭdon (Estraro). Eksterlandanoj, kiuj scivolas pri la nederlanda lingvo, bonvolu atenti, ke tiurilata kurso komenciĝos sabaton je la 10h00.

• Ni ĵus ricevis informon, ke la 2a Tutamerika Kongreso de Esperanto, antaŭe planita por la periodo inter la 17a kaj 19a de julio ĉi-jare, en Bogoto (Kolombio), ne okazos ĉi-jare sed estas prokrastita ĝis 1983.

Universitatoj

• Kiel ni jam anoncis pli frue, en Pekino okazis speciala Esperanto-kurso por 23 estontaj instruistoj de la Internacia Lingvo en diversregionaj ĉinaj universitatoj kaj altlernejoj. Okaze de la fino de tiu speciala kurso, UEA sendis librodonacon por ĉiu el la gekursanoj. En la pakaĵoj troviĝis i.a. 23 ekzempleroj de *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto.*

Instruistoj

• Ankaŭ en Venezuelo okazis speciala 5-monata kurso por instruontoj de Esperanto. La kurso, kiun gvidis prof. Rafael Mejía (kun helpo de kelkaj aliaj) finiĝis en majo ĉi-jare.

Sciencistoj

• La 12a en la serio de "Kulturaj prelegoj de Japana Esperanto-Instituto" estis tiu de d-ro Erik Høg, profesoro de la Universitato en Kopenhago. La prelego, kiu okazis la 12an de majo en la sidejo de JEI en Tokio, temis pri "La astrometria satelito Hipparcos". D-ro Høg (esperantisto ekde 1951) gvidas la sciencan projekton pri la satelito, lanĉota post kelkaj jaroj kaj ebligonta centoble pli precize difini la poziciojn de la steloj, ol tion permesas la ĝisnuna desurtera observado. La dana astronomo faras multajn prelegojn tra Japanio, kie li estas gasto de japana scienca institucio.



• **Eldonistoj: S-ro Kanzi Itô, multe pli bone konata kiel "ludovikito", ripozas en sia laborĉambro. La foto tamen trompas pri ripozo, ĉar post la dek volumoj de la Plena Verkaro de L.L. Zamenhof, nun aperis ankaŭ la unua kromkajero – "Senlegenda biografio de L.L. Zamenhof". Kiel konate, la eldonisto nun pretigas plenan kolekton de la Zamenhofaj tradukoj.**

Historio

• Sergej Ivanoviĉ Tanejev (1856-1915), konata rusa komponisto kaj teoriisto pri muziko, lernanto de P.I. Ĉajkovskij, kaj poste direktoro de la Moskva Konservatorio, estis esperantisto kaj korespondis i.a. kun Zamenhof. Tio evidentiĝas el la



unua el la tri volumoj de liaj "Taglibroj" (*Dnevniki*, Moskva: Muzyka, 1981). Tie montriĝas, ke Tanejev dum la unuaj ses monatoj, inter decembro 1894 kaj junio 1895, eĉ skribis siajn taglibrajn notojn en Esperanto. Tiuj notoj nun aperis tradukitaj el Esperanto en la rusan. La antaŭparolo al la volumo donas koncizajn informojn pri Esperanto.

Interlingvistiko

• Kiel suplemento al la studprogramo en la fako Literaturo kaj Lingvistiko ĉe la Universitato en Paderborn (FR Germanio), okazas regula kurso pri interlingvistiko. Ĝi ampleksas enkondukon en la teorion de interlingvistikaj studoj kaj praktikan parton en la formo de Esperanto-kurso. La instruadon gvidas d-rino Alicja Sakaguchi.

Tradukoj

• Ĉe la eldonejo Tor en Amsterdamo aperis la nederlandlingva traduko de *La infana raso* (1955) de William Auld. La tradukon faris d-ro W.A. Verloren van Themaat, kiu provizis *Het Kinderras* (tiel la libro nomiĝas en la nederlanda) per ampleksaj enkonduko kaj notoj. Pri ĉi tiu traduko, kiu certe estas unu el la plej ambiciaj en la historio de la Esperanta literaturo, d-ro Verloren

John Wells: Lingvistikaj aspektoj de Esperanto

Rotterdam: UEA/CED, 1978. 76p. 23cm. ISBN 92 9017 021 2. Klara kaj klera scienca analizo, laŭ la moderna lingvistiko, de la Internacia Lingvo. Nemalhavebla por la serioza esperantisto! Enkonduko • Fonetiko • Morfologio • Sintakso • Leksiko kaj semantiko • Fonetikaj simboloj • Bibliografio • Indekso de terminoj. Prezo: 12,00 guldenoj.

van Themaat konsultis plurajn konatajn esperantistojn, inter kiuj ĉefrolis la sudafrika Esperanta poeto Edwin de Kock. La libro estas aĉetebla ĉe UEA (19,80 gld).

• Fine de ĉi tiu jaro en Japanio aperos traduko de *Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo* (1979), aventura romaneto de Tibor Sekelj. La japanan tradukon pretigis Itirô Takasugi. Speciale por ĉi tiu eldono, japana pentristo (mem vizitinta Amazonion, scenejon de la rakonto) preparis aparte interesajn ilustraĵojn.

Persone

Dimo

• Se ekzistus konkurso por la movada prelegvojaĝanto de la jaro, la plej serioza kandidato por 1981/82 estus la aŭstralia geedza paro Jim kaj Jennifer Dimo. Ili ekvojaĝis la 9an de marto pasintjare kaj restos survoje ĝis la 1-a de decembro 1982. Ges-roj Dimo jam vizitis jenajn landojn: Britio, Hispanio, Greklando, Italio, Francio, FR Germanio, Aŭstrio, Svislando, Belgio, Nederlando kaj Luksemburgo. Ili jam faris pli ol 100 prelegojn, ĉefe en Esperanto-kluboj sed foje ankaŭ por ekstermovada publiko en lernejoj k.s. Vi povas diveni, ke ili ofte prelegas pri sia Aŭstralio, sed s-ro Dimo (jugoslav-devena aŭstraliano) volonte prelegas ankaŭ pri "Perspektivoj de Esperanto kiel internacia lingvo (kompare al la angla)". Ĉar ges-roj Dimo estas rotarianoj, ili ofte prelegas tiuronde.

Baur

• D-ro Arthur Baur, honora membro de UEA kaj prezidanto de Svisa Esperanto-Societo, komence de majo ĉi-jare vizitis Islandon. Kvankam la celo de la vizito estis studi la islandan kulturon, d-ro Baur kontaktis en Rejkjaviko multajn esperantistojn kaj prelegis en la ĉefurba Esperanto-Societo "La Aŭroro".

Interesa eldona novaĵo venis el Islando kun d-ro Baur, kiu raportas, ke tie aperis nacilingva traduko de la verko de Edmond Privat *Aventuroj de pioniro*, kies Esperantan originalon eldonis Stafeto en 1962.

Oficiala Informilo

N-ro 554

LA CENTRA OFICEJO ESTOS FERMITA DUM LA KONGRESO

La Centra Oficejo de UEA en Roterdamo estos fermita de la 22a de julio (ĵaŭdo) ĝis la 3a de aŭgusto (mardo) pro la 67a UK en Antverpeno. Kiel kutime, bonvolu ne skribi al la Oficejo dum julio kaj aŭgusto, krom se temas pri vere urĝaj aferoj.

SOCIETO ZAMENHOF 1982

Belgio: J.M. Van Ginderen-Martens. Britio: Kenneth A. Sly. Finnlando: Leo Teräntö. Japanio: Saburô Yamazoe. Nederlando: Ru H. Bossong. Svedio: Karl G. Lennart Lagerkrantz; Martin Säther; Signe Stenström; Åke Eldh; Eugen Rytenberg. Usono: Cecilia Peterson; Thomas H. Goodman; Milton O. Brown.

Entute ĝis nun 190 membroj.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,90 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj ne respondecas la redakcio.

Kun gejunuloj volas korespondi kaj interŝanĝi revuojn kaj poŝtmarkojn 19-jara ĉiliano: Héctor Campos Grez, Casilla 231, Curicó, Ĉilio.

Ĉe-metode instruadu ankaŭ vi, private aŭ lerneje, laŭ: *Esperanto laŭ la patrina metodo*, 320 paĝoj, GM 50,00! 50-instruhora kabareto lernigas **esperante** kaj **germane** ĉiujn demandojn kaj respondojn de la ĉiutaga konversacio! August Weide, Nordalbingerweg 65, D-2000 Hamburg 61, poŝtĝirkonto Hamburg 150 58-209.

Trans la sonizolan muron – komuniku kun surduloj kaj surdblinduloj: Jen tria libreto pri kontaktoj kun handikapuloj, 36-paĝa, ilustrita. Aĉetebla ĉe la Libroservo de UEA. Prezo: 2,70 gld.

Portu poŝtmarkojn al la Kongreso! Dum la 67a UK en Antverpeno funkcios tra la tuta semajno speciala Filatela Budo, kie deĵoros Fred de Geus, UEA-komisiito pri la poŝtmark-vendado. Bonvolu do porti al Antverpeno kiel eble plej multajn poŝtmarkojn, uzitajn kaj neuzitajn, belajn kaj filatele valorajn. Vi havos eblecon ne nur transdoni tiujn poŝtmarkojn al la Budo sed ankaŭ interparoli tie kun la komisiito kaj ricevi konsilojn, kiel plej efike helpi

al UEA per la kolektado de poŝtmarkoj. Antaŭdankon!

Recenzojn, en Esperanto, pri nacilingvaj libroj kaj filmoj deziras interŝanĝi s-ro Michael Jones, 3712-A Tulsa Way, Fort Worth, TX 76107, Usono.

Materialoj pri diversaj planitaj lingvoj urĝe serĉataj. A. Sakaguchi, Dörener Weg 8, D-4790 Paderborn, FR Germanio.

Ilustritan poŝtkart-interŝanĝon kun ĉiuj landoj deziras: Martin Hönig, Mörikestr. 5, D-7050 Waiblingen 7, FR Germanio.

Mi havas multajn leterojn pri interlingvistiko al kaj de la mortinta interlingvisto prof. Tammelo. Interesiĝantoj povos ricevi fotokopiojn de ili kontraŭ pago de 3 internaciaj respondkuponoj. D-ro W.A. Verloren van Themaat, Volkerakstraat 38/I, 1078 XT Amsterdam, Nederlando.

Ideala feriejo por esperantistoj estas Gastejo Edmond Privat de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Petu informilon!

Kun amerikanoj kaj eŭropanoj volas interŝanĝi poŝtmarkojn: s-ro Zhou Changqian, 550001, The Class for Advanced Studies, The Living Things Faculty, Teachers' College, Guiyang, Ĉinio.

Pri internacia pacdevigo volas korespondi John C. Lincoln, 3320 East Weldon, Phoenix, Arizona 85018, Usono.

gastigantoj 1982

APERIS, ĵus, la ĉi-jara kajero de la Pasporta Servo de TEJO. Ĝi estas 36-paĝa, kaj enhavas 477 adresojn en 48 landoj. La "Listo de gastigantoj 1982" – tiel ĝi nomiĝas – estas akirebla ĉe: Jeanne-Marie Cash, 5 allée des Félibres, F-31520 Ramonville St. Agne, Francio. La prezon de 32,00 francaj frankoj (aŭ egalvaloro) oni pagu al la poŝtĉekkonto 25426-58 Paris. La kajero estas aĉetebla ankaŭ ĉe la Libroservo de UEA kontraŭ 13,80 guldenoj. Bonan vojaĝon!

"**Monda kampanjo** por pli-vastigi nian movadon." Broŝuro 64-paĝa. Afrankite: 22 francaj frankoj, ĉe s-ro André Grossmann, 5 rue des Pyrénées, F-68390 Baldersheim. Poŝtkonto: 819.34 U Strasbourg.

Poŝtmarkojn pri la ĝisnunaj Olimpikaj Ludoj deziras interŝanĝi kontraŭ japanaj poŝtmarkoj, laŭ via gusto: Amo-Akademio, Tenmori, Kamisidami, Moriyama-ku, Nagoya, 463 Japanujo.

Zdravka Metz kaj Normand Fleury havas novan adreson: C.P. 829, St. Michel des Saints, Kebekio, Kanado J0K 3B0.

Disko/kasedo *Tra l' mondo* de Olivier Tzaut kaj nova disko/kasedo *Karnavaleto* aĉeteblas ĉe Olivier Tzaut, Arêtes 7, CH-2300 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Pĉk. 23-3656 La Chaux-de-Fonds. Oni mendu skribante sur la ĉekkuponon la deziratan objekton. Prezo (sendokostoj inkluzivitaj): disko: 24 sv.fr. Kasedo: 20 sv. fr. Vendas ankaŭ UEA.

Instruistino de Esperanto, laboranta en Bulgara Esperantista Asocio, fraŭlino, deziras konatiĝi kun serioza kaj fervora esperantisto, fraŭlo kun celo: korespondado p.ĉ.t. kaj longdaŭra amikeco! Eblas reciproka gastado! F-ino Bistra Dojĉinova, Ul. Kavala, Blok 42/D, 95 ap., BG-1233 Sofio, Bulgario.

Esperanto-Grupo Ismael (C.P. 10-2416, Brasília - DF, Brazilo) interŝanĝas spiritismajn Esperanto-librojn kontraŭ aliaj eldonaĵoj.

Spite ĝian altan prezon, pli ol 2 200 esperantistoj jam posedas ĉi tiun unikan verkon. Ne mirinde, ĉar la fakuloj epitetis ĝin jene: monumenta verkego (Waringhien), maksimuma kompleteco (Benczik), senprecedenca entrepreno (Régulo), giganta trezoro (Blanke), epopeo (Pool), miraklo de precizeco (Boulton), grandioza (Kurisu), treege valora volumo (Jung), kvazaŭ streĉa romano (Wells). Estas tempo zorgi, ke oni troviĝu en la lasta milo de la posedOntoj!

esperanto en perspektivo

Verkis Ivo Lapenna (ĉefred.), Ulrich Lins (red.) kaj Tazio Carlevaro. Eldonis UEA/CED, 1974. 876p. 20,5x14cm. 65 ilustropaĝoj. 40 indeksopaĝoj. ISBN 92 9017 016 6. Prezo: 84,00 (por Nederlando 87,36) gld., plus sendokostoj.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO de UEA!

Esperanto en radio



Ĉiujn informojn pri radio bonvolu sendi al la redaktoro de ĉi tiu rubriko: s-ro Georges Larglantier, 29 bvd. Murat, F-75016 Paris, Francio. Ĉi-sube estas la elsendohoroj laŭ la Grenviĉa Meza Tempo (GMT). Mallongigoj: I (informoj), P (parolado), K (kurso).

ĈIUTAGE

05.30-06.00 Varsovio, 200m (1503 kHz), 75.85m (3955 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz), 41.27m (7270 kHz). I.P. Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00950 Warszawa, Pollando.
11.00-11.30 Varsovio, 41.99m (7145 kHz), 31.50m (9529 kHz). I.P.
11.00-11.30 Pekino, 30.42m (9860 kHz), 19.87m (15100 kHz). I.P. Radio Pekino, Esperanto-fako, Beijing, Popola Respubliko Ĉinio.
13.00-13.30 Pekino, 19.78m (15165 kHz), 16.91m (17745 kHz). I.P.
16.30-17.00 Varsovio, 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz). I.P.
19.30-20.00 Varsovio, 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz). I.P.
20.00-20.30 Pekino, 30.10m (9965 kHz), 26.21m (11445 kHz), 19.80m (15150 kHz). I.P.
21.30-22.00 Varsovio, 200m (1503 kHz), 75.85m (3955 kHz), 50.04m (5995 kHz), 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz). I.P.
22.30-23.00 Pekino, 26.05m (11515 kHz), 19.78m (15165). I.P.

DIMANĈE

05.45-05.57 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 30.71m (9770 kHz), 24.97m (12015 kHz), 16.91m (17745 kHz). I.P. Radio Wien (ORF), Esperanto, Postfach 700, A-1041 Wien, Aŭstrio. Ripeto de la antaŭa sabata programo.
19.05-19.15 Vatikano, 196m (1530 kHz), 48.47m (6190 kHz), 48.30m (6210 kHz), 41.38m (7250 kHz), 31.17m (9625 kHz), 31.10m (9645 kHz), 25.64m (11700 kHz), 19.84m (15120 kHz). I.P. Radiovaticana, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italio.
22.00-22.15 Rio de Janeiro, 214m (1400 kHz). P. Brazila Spiritisma Federacio, av. Passos 30, BR-20051 Rio de Janeiro (RJ), Brazilo.

LUNDE

00.00-01.00 Sorocaba, 278m (1080 kHz). I.K. Rádio Clube de Sorocaba, Esperanto-redakcio, rua da Penha 455, BR-18100 Sorocaba (SP), Brazilo.
18.00-18.10 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66 (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz). P. Svisa Radio Internacia, Esperanto-fako, CH-3000 Bern 15, Svislando.
20.30-20.40 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz). P.

MARDE

22.45-23.00 Zagrebo, 262m (1143 kHz). P. Radio Zagreb, Esperanto-fako, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio.

ĴAŬDE

05.10-05.25 Vatikano, 48.30m (6210 kHz), 41.38m (7250 kHz), 31.17m (9625 kHz), 25.61m (11715 kHz), 25.55m (11740 kHz), 19.84m (15120 kHz), kaj M.F. 93.0 MHz, 96.5 MHz. I.P.
18.00-18.10 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.
20.30-20.40 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

VENDREDE

15.55-16.00 Vieno, 89.8 MHz (M.F.). I.
16.25-16.30 Pécs, 344m (873 kHz), kaj M.F. 67.1 MHz. Turistaj informoj dum la monatoj junio, julio, aŭgusto. Radio Pécs, Esperanto, Pf. 200, H-7601 Pécs, Hungario.

SABATE

16.45-16.57 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 30.71m (9770 kHz), 19.28m (15560 kHz). I.P.
18.00-18.10 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.
20.00-20.20 Romo, 41.24m (7275 kHz), 30.90m (9710 kHz), 25.42m (11800 kHz). P. Radio Roma, Esperanto, C.P. 320, I-00100 Roma Centro Corr., Italio.
20.30-20.40 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.
20.30-20.45 Valencio, 358m (836 kHz). P. La Voz de Valencia, Esperanto-fako, av. del Cid 154, Valencia 14, Hispanio.

ĜENERALA AŬDEBLECO

Tre multe da daŭraj aŭ ne-daŭraj aferoj povas helpi aŭ malhelpi la dissendadon de radiaj ondoj: vetero, sezono, parto de la tago, ĉirkaŭaĵo de la aŭskultanto, speco de ricevilo ktp. Tial ne eblas certigi, ĉu oni sukcesos klare ricevi elsendon en sia lando aŭ mond-parto. Jen tamen kelkaj ĝeneralaj informoj:

a) Direktitaj ondoj. **Pekino**: 9860 kaj 15100 kHz al Japanio kaj Koreo; 15165 kaj 17745 kHz al Sudorienta Azio; 9965, 11445 kaj 15150 kHz al Eŭropo; 11515 kaj 15165 kHz al Centra kaj Suda Ameriko. **Vatikano**: 9625, 11700 kaj 15120 kHz al Afriko; 6210, 9645, 11740 kHz al Ameriko; **Vieno**: 12015 kHz al Nordorienta Ameriko; 15560 kHz al Proksima Oriento; 17745 kHz al Aŭstralio kaj Azio.
b) Nedirektitaj ondoj kapteblaj longdistance: ondoj ne listigitaj ĉi-supre sub a) el **Berno, Romo, Varsovio, Vatikano, Vieno, Zagrebo.**
c) Nur loka aŭskultebleco por **Pécs, Rio de Janeiro, Sorocaba, Valencio** kaj ĉiuj disaŭdigoj per modulita frekvenco (M.F.).

EL FRANCIO la pariza privata stacio Radio Libertaire, organo de la anarkista federacio, per M.F. 89.5 MHz dissendas ĉiun vendredon de 18.00 ĝis 19.00 GMT dulingvan programon kun diversaj rubrikoj pri la Esperanta movado kaj elementa kurso.

Ne sufiĉas nur aŭskulti radioelsendojn en Esperanto! Vi devas ankaŭ foje skribi al la redaktejoj. Radio-redaktoroj ne povas kalkuli siajn aŭskultantojn. Nur per viaj leteroj ili scios, kiom da homoj utiligas kaj deziras daŭre ricevi elsendojn en la Internacia Lingvo.

Ĉirkaŭ

du mil homoj

jam havas ĝin!

Kiam en 1970 aperis *Plena ilustrita vortaro* (129,00 gld.), ĝi estis la sola baza verko havebla en la movada libromerkato. En 1974 aldoniĝis al ĝi *Esperanto en perspektivo* (84,00 gld.). Antaŭ du jaroj, Hungara Esperanto-Asocio represis la malnovan *Enciklopedio de Esperanto* (45,00 gld.), kaj – fine – per la eldono de *Plena analiza gramatiko de Esperanto* UEA kompletigis tiun eminentan kvaropon de la bazaj kaj elĉerpaj konsultolibroj pri (pli-malpli) ĉiuj aspektoj de la Internacia Lingvo kaj la Esperanto-movado.



Laŭ la ĝisnuna vendoritmo de *Plena analiza gramatiko*, eblas prognozi, ke ĝuste ĝi – la lasta aliĝinto al la kvaropo – plej baldaŭ forlasos la libromerkaton, ĉar jam nun, el la unua eldonkvanto de 3 000 ekzempleroj, apenaŭ restas kvarono. Serioza kialo por rapide mendi la verkon?

Plena analiza gramatiko de Esperanto (1935), K. Kalocsay (1891-1976) kaj G. Waringhien (1901-). Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1980 (4a tralaborita eldono). 599p. 22cm. Bindita. ISBN 92 9017 022 0. Prezo: 48,00 (por Nederlando 49,92) gld., plus sendokostoj. Triona rabato ekde 3-ekzemplera mendo.

Guido Gezelle

Unika poezia figuro en la pasintjarcentaj Flandrujo kaj Nederlando, Gezelle estas la plej fama flandra lirikisto de la 19a jarcento. Luksa, grandformata, bele ilustrita poemkolekto, kun originaloj kaj tradukoj en 12 lingvojn, inter kiuj ankaŭ Esperanto. **Mendu rekte ĉe: Eldonejo & Librejo SONORILO, Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk, Belgio, aŭ ĉe la Libroservo de UEA.**

Guido Gezelle (1830-1899). Red. B. Peleman. Antwerpen: Orteliusfonds-Uitgeverij MIM, 1980. 112p. Ilus. 31cm. Bind. Plurlingva. Prezo: 890,00 belgaj frankoj, plus sendokostoj. **Unika libro de unika poeto!**

Aperis libro de D-RO RUBEN FELDMAN-GONZALEZ, prezidinto de Argentina Esperantista Junulara Organizo kaj fondinto de Pasporta Servo de TEJO:

LA NOVA PARADIGMO EN PSIKOLOGIO (Eldonis: Paidos, Buenos Aires; hispanlingva; 222-paĝa).

En tiu verko, d-ro Feldman-González traktas pri observado laŭ difinita abstrakt-nivelo. La studo kombinas, laŭ nova vidpunkto, psikologion, fizikon kaj neŭrologion, reorganizante konatajn modelojn de la homa menso. Novaj direktoj por psikologio kaj psikoterapeŭtiko estas proponataj.

La libro estis verkita dum kvin jaroj (1975-80) da universitataj prelegoj kaj kolokvoj en 14 landoj (Usono, Eŭropo kaj Latin-Ameriko).

La verko, interalie, pritraktas konversaciojn kun la fizikisto prof. David Bohm (Universitato de Londono), kreinto de la koncepto "holokinesis" (tutmovo) kaj disĉiplo de Albert Einstein, kaj kun prof. Karl Pribram (Stanford, Kalifornio, Usono), kreinto de la "holografia memor-modelo". La aŭtoro kontaktis ankaŭ Jiddu Krishnamurti (edukisto) dum la libroverkado, plurfoje inter 1975-81.

Tiuj, kiuj interesiĝas pri traduko de ĉi tiu grava verko en Esperanton, kontaktu la aŭtoron: Rubén Feldman-González, Director Child Psychiatry, 1100 W. Lacey, Hanford, CA 93230, Usono.

NIKOLAJ RYTJKOV

DEK OK MAJSTROVERKOJ (DE ŜEKSPIRO ĜIS AULD) EN MAJSTRA INTERPRETO DE GRANDA AKTORO. SUR GRANDFORMATA DISKO (24,00 GLD) AŬ SUR KASETO (21,00 GLD). MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA!

Elektitaj Eroj

"Niaj grup-kunvenoj estas tedaj, tial mi ne plu vizitas ilin." Certe vi konas tiajn kaj similajn plendojn. Nu, vi ja ne tuj devas fondi — kiel oni faris en japana urbo Nagojo — monatan rondon AMIKARO DE MONATO, sed ankaŭ vi povas profiti el la riĉa materialo, kiun enhavas MONATO, por vigligi viajn kunvenojn. Neniam mankos temoj por priparoli, diskuti, aktiviĝi.

Se ankaŭ vi volas savi viajn grup-kunvenojn, petu varb-materialon ĉe: Eldonejo TK/Stafeto, Miksebaan 65 A, B-3130 Brasschaat, Belgio.

MONATO

internacia magazino sendependa

40 paĝoj DIN A4, riĉe ilustrita. Dek unu kajeroj plus poŝkalendaro jare. Jarabono 59,50 gmk aŭ 960 bfr. La abonon bonvolu sendi rekte al la eldonejo: TK/Stafeto p.v.b.a., Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat, Belgio — aŭ mendu ĉe landa peranto aŭ UEA (64,00 gld.; por Nederlando 66,56 gld.). Petu provekzempleron kontraŭ du int. respondkuponoj. (Tamen memoru, ke unu persono povas nur unufoje fari tian peton.)

gresillon
15-an - 28-an
de aŭgusto

ART-METIOJ

.fotoarto.korbofarado.
.librobindado...
praktika uzado de
la lingvo
dum agrablaj
manaktivaĵoj

por informoj kaj aliĝiloj tuj skribu al

franca esp. kulturdomo
49150 BAUGE Francio

NUDPIEDA GEN

LA 6a
DE AŬGUSTO
1945
ESTIS TAGO
DE MORTO
KAJ NASKIĜO
EN LA URBO
HIROSIMA. . .

"Oni nomas mian verkon bildrakonto pri atombombitoj. Jes, sed ne sole. Mi pridesegnis la dinamikon de milita furoro, la amon kaj malamon en la damnaj tagoj, tra la familio Nakaoka, kiu vivis en la fatala urbo Hirosima." — la aŭtoro.

NUDPIEDA GEN estas kvazaŭ aŭtobiografio de Nakazawa, la aŭtoro, kiu mem travivis la Tagon, la hororon de atombombita Hirosima. Foje streĉa, foje humura, la "real-komikso" komenciĝas en aprilo 1945 kaj atingas la klimakson: la 6an de aŭgusto. La originalo estas ankaŭ filmigita, noveligita, operigita, movbildigota; angligita, germanigita. . . Ne temas pri simpla infana literaturo.

"HIROŜIMO" ne estas io pasinta, sed io HODIAŬA.

Nudpieda Gen (1973), Keizi Nakazawa (1929 -). Eljapanigis Yukio Izumi. Tokio: Rondo Gen, 1982. 4+284p. Bildstria romano. 21cm. Prezo: 30,00 gld., plus sendokostoj. Mendebla ĉe: UEA, JEI, KLEG.